

EL POPOLA ĈINIO



27
"Pro la Granda Unuiĝo de la Nacioj de la Ĉina Popola
Respubliko!"

Akvarelo de Je Ĉjan-ju

Okt.
1953

10/10/53

Nova Ĉinio Marŝas sur la Vojo de Industriigo

U Leng-ŝji

En la unuaj kvar jaroj de la ekzistado de sia propra ŝtato, la ĉina popolo marŝis de venko al venko. Plenuminte serion da gravaj sociaj reformoj kaj la taskon de ekonomia restarigo, ili komencis sian planitan nacian ekonomian konstruadon. La 1-a de januaro, 1953, markis la komencon de la unua kvinjara plano de ekonomia disvolvo de la Ĉina Popola Respubliko.

Kiam la Ĉina Popola Respubliko ĵus fondiĝis, la lando ankoraŭ estis en malfacila situacio. Socia ordo ankoraŭ ne plene establiĝis. La sistemo de feŭda terposedo daŭris ekzisti en granda areo de la lando. La imperiista influo ankoraŭ konservis konsiderindan forton en ekonomio kaj kulturo de la lando. La industria kaj agrikultura produktado terure difektiĝis de la milito. Komerco apenaŭ ekzistis inter la urboj kaj kamparo, kaj la popola vivo estis ege malfacila.

Dum la kvar jaroj pasintaj, la Centra Popola Registaro faris sinsekvon da sociaj reformoj, forbalais la restantan forton de la enlanda kaj fremda reakcio, kaj koncentrigis ĉiujn fortojn por restarigi la ruinigitan nacian ekonomion. Efektivigita estas la agrara reformo, kiu frakasis la sistemon de feŭda terposedo, kaj pli ol 300 milionoj da kamparanoj, al kiuj tero mankis aŭ ne sufiĉis, ricevis siajn porciojn da tero. La banditoj estas ekstermitaj kaj la kontraŭrevoluciuloj estas subpremitaj. La restanta influo de la imperiistoj en la ekonomia kaj kultura vivo estas preskaŭ tute eliminata. La de fremdlanda kapitalo irigitaj entreprenoj influantaj la nacian ekonomion kaj popolan vivon jam estas metitaj sub la direktado de la registaro. Ĉiujn kulturajn kaj edukajn instituciojn de imperiistoj direktitajn la registaro transprenis kaj reformis. La movado por plenumo de la Geedziĝa Leĝo kontraŭ feŭda geedziĝo kaj la patriota higiena kampanjo kontraŭ la Usona bakteria milito kreis novan socian atmosferon. La movadoj *San Fan* (Tri Kontraŭoj) kaj *U Fan* (Kvin Kontraŭoj)* rimarkinde plifortigis la proletan ideologion inter la popolo kaj la la gvidan rolon de socialisma elemento en la nacia ekonomio. La movado rezisti Usonan agreson kaj helpi Koreion ne nur gardas la landlimon de Ĉinio, sed ankaŭ alte levis la patriotisman spiriton kaj entuziasmon de la popolo, akcelante la iradon de socia reformo kaj ekonomia restarigo. La sukcesa efektivigo de ĉiuj ĉi kampanjoj kaj movadoj ege ŝanĝis la karakteron de ĉina socia vivo.

Rapida Restariĝo

La rapida restariĝo kaj disvolviĝo de la nacia ekonomio estigis senprecedence viglan prosperon tra la tuta lando. Ĝis la fino de 1952, escepte de karbo, la tutlanda industria kaj agrikultura produktado jam atingis kaj superis la plej altan nivelon antaŭ la liberiĝo.

Jena tabelo montras la staton de la restariĝo kaj disvolviĝo de la ĉefaj branĉoj de industria kaj agrikultura produktado:

<i>Produktaĵoj</i>	<i>Produkta kvanto en 1952 (1949=100)</i>
Fandfero	764
Ŝtalo	846
Karbo	202
Elektra Povo	164
Kruda Oleo	358
Cemento	433
Koton-teksaĵo	287
Papero	331
Sukero	199
Grenoj	145
Kotono	291
Tabako (bakita)	411

La proporcio de industria produktado en la tuta nacia ekonomio rapide leviĝis. Ankaŭ kreskas rapide la ŝtata industrio de socialisma karaktero kaj la kooperativa industrio de duonsocialisma karaktero. La ŝtat-kapitalisma industrio ankaŭ certgrade disvolviĝis dum la proporcio okupata de privat-kapitalisma industrio fariĝis malpli granda. La proporcio de la diversaj sektoroj (inkluzive metiajn laborejojn) en la industrio ŝanĝiĝis kiel jene:

	En 1949	En 1952
Ŝtata Sektoro	33.9%	50%
Ŝtat-kapitalisma Sektoro	2.4%	5%
Kooperativa Sektoro	1%	3%
Privata Sektoro	62.7%	42%

Koncerne al la moderna industrio sola (ekskluzive de la industrio de metia karaktero), la proporcio en 1952 montriĝis kiel jene:

Ŝtata Sektoro	60% (ĉirkaŭ 80% en peza industrio kaj ĉirkaŭ 50% en malpeza industrio)
Ŝtat-kapitalisma Sektoro	6%
Kooperativa Sektoro	3%
Privata Sektoro	31%

Granda sukceso ankaŭ estas akirita en agrikultura produktado. Multe kreskis la nombro de kamparanaj familioj organiziĝintaj por iri la vojon de kooperativo. Ĝis la fino de 1952, organiziĝis ĉirkaŭ 40% de la kamparanoj. Pli ol 200 milionoj da kamparanoj partoprenis interhelpajn grupojn (dumtempajn kaj daŭrajn) kaj agrikulturajn produktajn kooperativojn.

Komunikado kaj transportado ankaŭ restariĝis kaj disvolviĝis sammaniere. Multe ekspanziĝis la komerco inter la urboj kaj kamparo. La ŝtata kaj kooperativa komerco okupis en 1952 pli ol 50% de la suma valoro de la enlanda pogranda komerco. En la detala komerco, ili okupis ĉirkaŭ 32% en ok grandaj urboj.

La komerco kun eksterlando ankaŭ kreskis, precipe kun Sovetunio kaj la Popolaj Demokratioj.

La varprezoj estas ĝenerale stabilaj tra la tuta lando kaj eĉ iom malaltiĝis. Se ni prenas la prez-nivelon en marto 1950—la monato de plej altaj varprezoj post la liberigo, —kiel 100, do en de-cembro, 1951 la indico staris ĉe 96.6 kaj en decembro, 1952 ĉe 90.6.

Surbaze de la disvolvigo de produktado, disvastigo de komerco kaj stabilo de varprezoj, la materia kaj kultura vivo de la popolo akiris unuapasan pliboniĝon. En 1952 la kvanto de nutraĵoj kaj ĉiutagaj necesajoj provizitaj de la ŝtataj vendejoj al la popolo pligrandigis respektive je 91% kaj 106% kompare kun 1951.

Dum la pasintaj tri jaroj la nombro de studen-toj de ĉiugradaj edukaj institucioj pligrandigis kaj superis la rekordan nombron en ĉina historio. En 1952 la nombro de lernantoj en elementaj lernejoj estis 101% super tiu en 1949, en gimnazioj 142%, kaj en la altlernejoj 55%.

Planita Ekonomia Konstruado

La efektiviĝo de sociaj reformoj kaj ekonomia restarigo kreis bazon por disvolvo de konstruado. En la jaro 1953 la Ĉina Popola Respubliko komencis plenumi la unuan landkonstruan kvinjaran planon.

La fundamentaj taskoj de la plano estas: antaŭ ĉio koncentrigi la ĉefan forton por disvolvi la pezan industrion kaj konstrui fundamenton por indus-triigo de la lando kaj modernigo de nacidefendo; konforme al tio, kulturaj konstruajn laborantojn, disvolvi komunikadon kaj transportadon, malpezan industrion kaj agrikulturon kaj disvastigi komer-con; antaŭenigi kooperadon en agrikulturo kaj metioj kaj reformi privatajn industrion kaj komercon paŝo post paŝo; ebligi la individuajn agrikulturan produktadon, metiojn kaj privatajn industrion kaj komercon ĝuste plenumi sian funk-cion.

Ĉio ĉi tio servos por garantii firmpaŝan kres-kon de la socialisma elemento en la nacia ekonomio kaj por garantii paŝo-post-paŝan altigon de la materia kaj kultura vivnivelo de la popolo surbaze de plua disvolvigo de produktado.

Dum la kvin jaroj ekde 1953, Ĉinio disvolvos per granda forto la feran kaj neferan metalurgion, maŝin-fabrikantan industrion, karban industrion, petrolan indus-trion, elektro-povan industrion kaj nacidefendan indus-trion. Novaj industriaj bazoj konstruiĝos en la regionoj riĉaj je mineraloj kaj malproksimaj de la marbordo. Ĉinio havos sian propran industrion sendependan. Ĝi mem produktos maŝinfabrikojn, precizajn instru-mentojn, aŭtojn, traktorojn, kaj ekipaĵojn por nacia defendo. La centjara revo de la ĉina popolo pri landa industriigo estos realigita.

Disvolviĝos ankaŭ komunikado kaj transportado. Novaj fervojoj kaj aŭto-vojoj disetendiĝos en la mon-toza Sudokcidenta Ĉinio, riĉa je mineraloj kaj agri-kulturaj produktaĵoj, kaj la vasta Nordokcidenta Ĉinio, havanta brilan estontecon por la disvolvigo de industrio kaj bredado de dombestoj, kaj ligos ilin kun la ceteraj partoj de la lando.

En la sfero de malpeza industrio, multe da modernaj teksaj fabrikoj, paper-manufakturoj, nutraĵo-pro-duktejoj, suker-rafinejoj kaj ĥemi-sterkaj fabrikoj konstruiĝos en novaj industriaj centroj, kiuj estiĝos en



La Patrolando Konstruiĝas en la Epoko de Maŭ Ze-tung.

Afiŝo pentrita de Li Ĉi

la interno de la lando, proksime de la fontoj de krud-materialoj. La nombro de spindeloj en la lando plimul-tiĝos je kelkaj milionoj en la venontaj kvin jaroj. Dank' al tiuj ĉi progresoj, la materiaj bezonoj de la popolo pli bone plenumiĝos.

Granda nombro da mezgradaj teknikaj lernejoj kaj novaj institutoj por pli alta divers-speca lernado estos pligrandigita aŭ starigita por eduki milionojn da lertaj laboristoj, inĝenieroj, teknikistoj, fabriakaj ad-ministrantoj kaj novtipaj intelektuloj kun fakscio de moderna scienco. Laboristoj kaj kamparanoj havos grandan eblecon por ricevi ĉiuf flankan edukon.

Estos plua disvolvo de kooperativoj en agrikultura kaj metia produktado en la venontaj kvin jaroj. Private funkciigataj industrio kaj komerco estos funda-mente direktataj al la vojo de disvolvo al ŝtata kapita-lismo. La socialisma kaj duon-socialisma sektoroj ludos pli kaj pli gravan rolon en nia industrio, precipe en peza industrio, kaj havos superan influon en komerco.

Senprecedenca Rapideco

La rapideco de la industriigo de Ĉinio en ĝia unua kvinjara plano estos senprecedenca. La industria nivelo, kiun la kapitalismaj landoj en la okcidento atingis en 30 ĝis 50 jaroj, estos atingita de Ĉinio en kvin jaroj. La rapideco de la industriigo de Ĉinio estos multe

pli granda ol tiu de Rusio post la Oktobra Revolucio, ĉar Ĉinio ricevos ĉiuflankan, longdaŭran kaj senegoisman helpon de la potenca socialisma ŝtato, Sovetunio. La registaro de Sovetunio jam konsentis doni sisteman ekonomian kaj teknikajn helpon al Ĉinio de nun ĝis 1959, por la konstruado aŭ pligrandigo de 91 entreprenoj, krom tiuj 50 entreprenoj, kiuj estas nun konstruataj aŭ rekonstruataj. Interalie inkludiĝas feraŝtalaj kombajnoj, neferaj metalurgiaj entreprenoj, karbo-minejoj, oleo-rafinejoj, dekoj da fabrikoj por maŝinoj, aŭtomobiloj kaj traktoroj, elektrejoj kaj nombro da nacidefendaj industribranĉoj. La helpoj donitaj de Sovetunio por konstruado de tiuj ĉi entreprenoj kovras vastan agadkampon: de la geologiaj esploroj, projektado, liverado de konstru-ekipaĵoj, instalado de maŝinoj ĝis komenco de produktado kaj kulturado de diversaj laborantoj por konstruado kaj funkciado de ĉina industrio. La Sovetia helpo havos decidan signifon en la industriigo de Ĉinio. La elkora dankemo de la ĉina popolo al la Sovetia popolo estas plene esprimita en la telegramo de Prezidanto Maŭ Ze-tung al G. M. Malenkov, Prezidanto de la Konsilo de Ministroj de Sovetunio.

Celoj por 1953

La amplekso de la unua kvin-jara plano estas neniel malgranda. La ŝtata elspezo por nacia ekonomia konstruado en 1952 estis 421, en 1953 estos 596, se tiu en 1950 estas prenata kiel 100. La tuta valoro de industria kaj agrikultura produktaĵoj en 1953 superos tiun en 1952 je 12%; la industriaj produktaĵoj je 23% (la ŝtatposeda industrio je ĉ. 32%), kaj la agrikulturaj produktaĵoj je 6%. La fiksitaĵoj por la ĉefaj produktaĵoj en 1953 montriĝas jene (100 por 1952):

Fandfero	114
Ŝtalingotoj	123
Ŝtalaj Produktaĵoj	134.8
Kupro	128.6
Karbo	97.8
Elektra Povo	127
Kruda Petrolo	142
Metalo-tranĉaj Maŝinoj	104.6
Generatoroj	290
Motoroj	141.2
Azota Acido	134.3
Cemento	129.7
Kotona Ŝpinaĵo	109
Kotona Teksaĵo	116
Sukero	123
Papero	106
Segligno	138
Grenoj	106
Kotono	116
Tabako (bakita)	102.8

En la nuna jaro, konstruiĝis en Anŝan la unuaj grandaj ŝtalprema fabriko kaj senjunt-ŝtaltuba fabriko iam ekzistantaj en Ĉinio. Fininstaliĝis multaj grandaj kaj malgrandaj blovfornoj, kiuj povas produkti kelkcent mil tunojn da fero poĵare. Novaj hidroelektraj kaj termoelektraj povostacioj havantaj produkt-povon de kelkcent mil kilovatoj, baldaŭ aperos. Novaj karbominoj malfermiĝos kaj ole-putoj estos drilitaj. La produktado de grandaj maŝinfabrikoj kaj generatoroj de kelkaj miloj da kilovatoj jam komenciĝis. Novaj teksejoj kun kelkcent mil spindeloj estos starigitaj en Pekino, Ŝiĝaĝuang, Gengĝoŭ, Ŝjangtan, Ĉengtu kaj aliaj urboj. Multaj paperfabrikoj kaj sukerrafinejoj kun modernaj ekipaĵoj estos konstruitaj aŭ renovigitaj.

Pli ol 600 kilometroj da novaj fervojoj finkonstruiĝos ĉijare; la reto de aŭtovojoj kaj enlandaj akvo-vojoj estos plue disvolvita; novaj vaporŝipoj kaj novaj kajoj ankaŭ baldaŭ kompletigos.

Daŭras la grandskala laboro de akvokonservo. La tria-jara tasko de la Hŭaj-rivero-subjugado inkluzive de la konstruado de tiaj gigantaj akvokonservejoj kiaj la Foziling-a k.a. estas plenumata. Kvin navigaciaj kluzoj sur Sanho-rivero, ĉe Ĵunhoĝi kaj en aliaj lokoj kaj 14 arkdreniloj jam estas finkonstruitaj. Sur Jungding-rivero la alta digo de la Ĝuan-ting-akvokonservejo, kiu entenos 2,270,000,000 kubmetrojn da akvo ankaŭ estas finkonstruita.

Enlanda kaj fremdlanda komerco estas ekspansiigata. La tuta kvanto de elvenditaj komercaĵoj sur enlanda merkato en 1953 plimultiĝos je 30% kompare kun tiu en lasta jaro. Eksterlanda komerco plimultiĝos je 32%. La ŝtatposedaj komercaj organizoj liveros ĉirkaŭ 70% pli multe da nutraĵoj kaj ĉirkaŭ 50% pli multe da ŝtofoj por la konsumado de la popolo, kompare kun 1952.

La popolo havas multe pli favoran ŝancon por sin eduki. Lernantoj en



Arbaro: Post la liberigo, ĉio ŝanĝiĝis. Mi provizas reltrabojn kaj vi liveras ŝtalajn relojn. Kiom da fervojoj ni jam konstruis en la pasintaj kvar jaroj.

Fer-mino: Vi ja pravas! Antaŭe la Kuomintangaj reaktiuloj nur ekspluatit la popolon, rabante ilian monon. Sed nun la Kompartio ekspluatas la naturriĉaĵojn por servi la popolon. Post miloj da mallumaj jaroj, nun ankaŭ ni havas belan tempon!

elementaj lernejoj nun superas 55,000,000. Mezlernejanaj nombras pli ol 3 milionojn. Altlernejanaj nombras pli ol 220 mil, elmontrante pli multigon de 10% ol en lasta jaro.

Ekde la jarkomenco, la popolo tra la tuta lando entuziasme sin okupadis en la landkonstruo, daŭrigante la kampanjon rezisti Usonon kaj helpi Koreion kaj klopodante por armistico en Koreio. Grandajn sukcesojn ĝi jam atingis dum la unua jarduono en la plenumado de ĉijara plano.

La produktplanoj de ŝtataj industrioj por la unuaj ses monatoj de tiu ĉi jaro estas plenumitaj je 101%; la produktplanoj por ŝtalo, fandfero, kupro, cemento, kruda petrolo, torniloj, ŝpinaĵoj, kotonteksajo, kaŭĉukaj radringoj, k.a. estas superplenumitaj. Ankaŭ en privataj industrioj produkto kreskis. Ekz. la produktkvanto de la privataj industrioj en Ŝanhajo, en la tempodaŭro de januaro ĝis majo ĉijare, elmontris plialtigon de 29%, kompare kun tiu en la korelativa periodo de lasta jaro.

Rilate fundamentan rekonstruadon, ĉijara tasko estas kolosa. Sed spite de tio, la 746 entreprenoj, por kiuj la ŝtato investis 90% de sia tiucela kapitalo, finfaris tiom da laboro dum la unua jarduono, kiom 240% de tiu de la korelativa periodo de lasta jaro.

En agrikulturo, multaj regionoj jam gajnis abundajn rikoltojn, kaj laŭ antaŭtakso la produktkvantoj de grenoj kaj kotono egalos al tiuj de la lasta jaro.

Fervojoj kaj aliaj komunikrimedoj admirinde plenumis siajn planojn. Fervoja transporto en la unuaj ses monatoj de 1953 superis planon je 17 procentoj kaj river-transportado je 23 procentoj.

Koncerne enlandan komercon, la merkatoj svarmplenas de negocoj. Kvankam la unua jarduono laŭkulture estas la "malvigla sezono" en Ĉinio, sed komerco estis aktiva, kaj en multaj lokoj superas la kvanton en la sama periodo de lasta jaro. Eksterlanda komerco estas ankaŭ plenumita laŭplane.

Por diri mallonge, la tuta ekonomia stato de la lando estas stabila kaj havas tendencon leviĝi supren. La ĉefaj branĉoj de la nacia ekonomio fundamente plenumas siajn planojn. Nun la popolo organizas tutlandan movadon, kiu celas plimultigi produktojn, plialtigi enspezojn, praktiki ekonomion kaj redukti elspezojn por utiligi la maksimuman rimedon por industria konstruado. Laborante energie por superplenumi ĉi-jaran planon, la popolo tra la tuta lando sin ĵetas entuziasme en tiun ĉi movadon.

La laboristoj fariĝis des pli aktivaj en plibonigado de sia laboro. Ili plene liberigas sian kreemon plimultigante produkton, plibonigante la kvaliton de produktaĵoj, kaj reduktante produktan koston. Multaj fabrikoj, entreprenoj kaj organizoj kaj multaj progresaj laboristoj kaj brigadoj faris planojn por plimultigi produkton kaj praktiki ekonomion dum la venontaj tri monatoj promesante superplenumi siajn originalajn kvotojn por la jaro kaj krei pli da riĉaĵo por la lando. La kampanjoj ankaŭ laboras per tuta forto por pliiĝi siajn rikoltojn de grenoj kaj industriaj plantaĵoj.

Tiu ĉi jaro estas jaro de grandaj venkoj por la ĉina popolo kaj ankaŭ de grandegaj ŝanĝoj. Ĝi estas jaro de mirindaj atingoj sur la ekonomia fronto, dum la batalo por rezisti Usonan agreson kaj helpi Koreion estas plifortigita kaj la intertraktado por Korea

armistico jam akiris sukceson. Ĝi estas jaro de la komenciĝo de la unua kvinjara plano de landa konstruado, post la efektivigo de ekonomia restarigo.

En la kvar jaroj depost la fondiĝo, la Ĉina Popola Respubliko trapasis multe da severaj provoj. Tio ne nur pruvis, ke kun helpo de la fortoj de paco kaj demokratio gvidata de Sovetunio, ĝi povas frakasi ĉiun ajn imperialistan provokon, sed ankaŭ ke ĝi povas venki la plej diversajn malfacilojn. Ĝi rapide resanigis la vundojn, kiujn la nacia ekonomio ricevis dum la milito, kaj komencis atingi mirindajn sukcesojn en sia granda programo de ekonomia konstruado. La Ĉina Popola Respubliko ekaperas sur la internacia areno kiel potenca nova lando, grava faktoro en internacia vivo. Tion eĉ niaj malamikoj estas devigitaj konfesi, ĉu ili tion ŝatas aŭ ne.

La 1-an de oktobro, celebrante la kvaran datrevenon de la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko, la ĉina popolo povas ĝoji kun fiero pri tiuj brilaj atingoj.

La ĉina popolo alfrontas siajn gigantajn kaj glorajn novajn taskojn kun granda memfido. Ili sin unuiĝis sub la gvido de la Ĉina Komunista Partio kaj sia granda gvidanto, Prezidanto Maŭ Ze-tung. Kun sia ĉiam kreskanta entuziasmo kaj krea kapablo kaj kun la granda kaj malavara helpo de Sovetunio kaj la subteno de la Popolaj Demokratioj, ili havas firman kredon ke ili plenumos kaj superplenumos la fiksatajn taskojn de la unua jaro de sia unua kvinjara plano.

* *San Fan* estis movado por elimini koruptigon, malŝaron kaj burokratismon inter la funkciuloj en registaraj organizoj kaj publikaj entreprenoj. U *Fan* estis movado por elimini inter privataj industriaj kaj komercaj entreprenoj subaĉeton, kontrabandon kaj imposteviton, ŝtelon de ŝtata propraĵo, fuŝlaboron kaj uzadon de netaŭgaj materialoj por registaraj kontraktoj, kaj spionadon por akiri ekonomian informon el registaraj fontoj por merkata spekulacio.

Kurantaj Aferoj

Pekino Rememorigis Naskiĝtagon de L. N. Tolstoj

La 125a datreveno de la naskiĝo de la granda rusa verkisto Leo Nikolajevič Tolstoj estis rememorigata en Pekino vespere de la 8a de septembro en kunveno okazigita kune de la Pekina Ĉinia-Sovetia Amikeca Asocio, la Pekina Federacio de Literaturaj kaj Artaj Rondoĵoj kaj la Tut-Unia (U.S.S.R.) Societo por Kulturaj Rilatoj kun Fremdaj Landoj.

La kunveno estis prezidata de la fama verkisto Laŭ Ŝe, Viciprezidanto de la Pekina Ĉinia-Sovetia Amikeca Asocio. Dung Ĉju-si, tradukinto de "Milito kaj Paco" fama novelo de Tolstoj, faris detalan raporton pri la vivo kaj laboro de Tolstoj. Diskutante la artan valoron de la verkoj de Tolstoj, li diris: "Memore de Tolstoj hodiaŭ ni devas lerni de lia literatura heredo ne nur lian realismon en arto, sed lian profundan amon al la popolo kaj lia lando.

La dokumenta filmo de teatra prezentado de "Anna Karenina" de Tolstoj estis ludata en la kunveno. La ekspozico de bildoj kaj pentraĵoj pri la vivo kaj verkoj de Tolstoj kaj la eldonado kaj teatra prezentado de liaj verkoj en Sovetunio malfermigis en la sama tago en Pekino.

Liberigitaj el Usonaj Hombuĉejoj

Nia Speciala Korespondanto

Ĉe la enirejo al la akcepta areo de la korea-ĉina flanko staris alta ruĝa arkajo kun la vortoj "Via Patrio Ĉirkaŭprenas Vin!" en la korea kaj ĉina lingvoj. Suden de tiu ĉi arkajo etendiĝas la ŝoseo al Munsan, serpentumante tra la ondantaj montetoj. Ĉiumatene, komence de la 5a de aŭgusto, ŝarĝaŭtoj de reenpatriigataj koreaj kaj ĉinaj militkaptitoj rapidis sur la ŝoseo. En la aŭtoj, svingante grandajn kaj malgrandajn koreajn kaj ĉinajn naciflagojn plejmulto de la revenantoj estis senvestaj ĝis talio kaj nudpiedaj, portante nur siajn kalsonojn. Tra la tuta vojo, eĉ la malsanuloj kaj vunditoj kuŝantaj sur brankardoj forĵetis ĉion, kion la abomeninda malamiko al ili disdonis dum la reenpatriigo. Ĉe ambaŭ flankoj de la ŝoseo estis senorde disĵetitaj vestaĵoj, ledaj ŝuoj kaj armeaj litkovriloj.

La reenpatriigitoj kantis, laŭte kriis sloganojn kaj svingis flagojn. Ili revenis nekonkeritaj!

Ili ankaŭ kunportis pluan nerefuteblan atestojn pri, kaj deklarojn protestantaj kontraŭ la kruela traktado kaj masakro al koreaj kaj ĉinaj militkaptitoj fare de la Usonaj imperiistoj kaj ili postulis, ke tiuj ĉi estu publikigitaj. Ili alvokis ĉiun amanton de justeco denunci kaj puni la Usonajn imperiistojn kaj iliajn lakeojn, la Ĉjang Kaj-ŝek- kaj Singman-Rhee-bandidarojn pro la abomenaj krimoj, kiujn ili faris.

Kruela Traktado

La revenintaj ĉinaj popoloj volontuloj diras, ke neniŭ el ili havis satigan manĝon de la momento kiam ili estis kaptitaj ĝis la tago de ilia reveno. En Tereno 602, ili manĝis hordeon kaj fabojn taŭgajn nur por dombestoj.

Al la koreaj kaj ĉinaj militkaptitoj eĉ ne estis donita sufiĉe da trinkakvo. En unu militkaptitejo, kiu entenis ĉ. 10,000 militkaptitojn, troviĝis nur unu akvo-

krano, kiu eĉ en somero provizis akvon nur por kvar ĝis ses horoj ĉiutage! Kaptitoj, kiuj fosis en ŝlimejon celante akiri akvon por kvietigi la netolereblan soifon, estis pafataj pro "provo forkuri".

Ili estis pakitaj en tendoj aŭ kabanoj kiuj estis tro malgrandaj por ke ĉiuj povus sin kuŝigi samtempe. Gardistoj postenis ĉie. Tutaj batalionoj kun gasmaskoj kaj fiksitaj bajonetoj kaj tankoj estis plurfoje uzataj por amasbuĉi la kaptitojn senkore.

Ili estis devigataj fari ĉiajn pezajn laborojn: porti karbon, cementon kaj municion el militŝipoj, purigi kazernojn, ripari vojojn, ebenigi teron aŭ dispecigi ŝtonojn por la Usona armeo. Por sia laboro ili ricevis nur insultojn, piedbatojn, frapojn per pafilteniloj, bastonoj aŭ vipoj.

Peniga laboro estis nur unu formo de kolektiva puno en la militkaptitejoj. Alia formo estis ĉesigi liveron de manĝo kaj akvo. En iu ejo por malsanaj kaj vunditaj militkaptitoj eĉ Pusan, manĝo estis foje haltigita por dek unu sinsekvaj tagoj!


Estis multe da pretekstoj por tiaj kolektivaj punoj: kantado, tro multa parolo, "dangera" silento...

La "Kribrado"

Dum la tiel nomita "kribrado" celanta deteni la militkaptitojn, la krueleco de la malamiko atingis sian kulminon. Ĉiu paŝo de la longa procedo de "registrado", "kontrolo" kaj "kribrado" estis preteksto por pli da torturoj.

La aŭtoritatoj de la Usona armeo sendis grandan nombron da specialaj agentoj, provokantoj de Tajvan kaj Singman-Rhee-agentoj por "kribri" la kaptitojn perforte kaj devigi ilin ffordoni siajn rajtojn de reenpatriigo.

Tankoj kaj soldatoj
pretaj por plenumi
la Usonan "neperfor-
tan" politikon al la
koreaj kaj ĉinaj
militkaptitoj sur
Koĵe-insulo.



En la nokto de la 8a de aprilo, 1952, antaŭ la "kribrado" al ĉinaj militkaptitoj, la Ĉjang-kaj-ŝek-banditoj tranĉis pecojn da karno de sur sesdek du homoj en Militkaptitejo 72, ĉar ili insistis pri reveno al sia patrio. Kun homa karno svinge pendanta de iliaj ponardoj, tiuj ĉi bestoj, minacis la militkaptitojn, anoncanta ke ili faros pasteĉojn el la karno de tiuj kiuj postulis reenpatriigon. Militkaptitoj kiuj rifuzis iri al Tajvan kaj insistis reveni en sian patrion estis kruele murditaj kaj senmembrigitaj "kiel ekzemplo" al la aliaj.

Spite de tiuj ĉi kruelaj agoj, multaj militkaptitoj elkuris el la "kribrito"-tendoj la duan tagon, trarompis la ĉirkaŭsieĝon de specialaj agentoj armitaj per ponardoj kaj bastonoj kaj kuris al la militkaptitejo por tiuj, kiuj insistis pri reenpatriigo. Multaj estis batitaj ĝis

senkonsciigo pro tio, kaj estis reen trenitaj al la ejo por tiuj "kiuj rifuzas reenpatriigon." Estis ĝuste en tiu momento ke, ĉe la konferenco en Panmunjom, la Usonaj delegitoj senhonte parolis pri "volonta reenpatriigo" kaj "nedevega reenpatriigo."

Kvankam la sangaj masakroj en la militkaptitejoj intensiĝis kun ĉiu tago, la koreaj kaj ĉinaj militkaptitoj daŭrigis sian batalon kontraŭ "kribrado" kaj perforta deteno post la armistiko.

Usonaj kruelaj agoj kontraŭ la militkaptitoj daŭris ĝis la lasta minuto. Eĉ kiam reenpatriigo komenciĝis, la malamiko ĵetis 600 gasbombojn sur la unuan areon da ĉinaj militkaptitoj reenpatriigataj de Ĵeju-insulo. Pli ol 140 el ili estis venenitaj. Survoje al la interŝanĝaj stacioj, grandaj nombroj da kaptitoj malsaniĝis kaj

svenis rezulte de mangado de putraĵoj. Sed kiam ili atingis la interŝanĝan areon ĉe Panmunjom ili kantis, kriis sloganojn kaj protestojn, kun voĉoj ĉiam tiel decidemaj!

Tiuj ĉi homoj kun splitoj de gasbomboj, kontuzoj kaj brulvundoj en iliaj korpoj kaj multaj el ili ankoraŭ senkonsciaj pro gasatakoj, estas miloj da vivaj atestoj pri la abomena hipokriteco de la Usonaj militinstigantoj kaj de ilia parolo pri humanismo.

Liberiĝinte el la Usonaj hombuĉejoj, ili denove rigardas al la demokrata mondo, al ĝia paca pejzaĝo. La rizkampoj punktitaj per blankaj ardeoj promesas riĉan rikolton. Ĉe la pordo de la sanitara centro, kaŝata en arbaro de brilaj flagoj, patrinoj, edzinoj kaj infanoj ilin salutas. Nepriskribebla ĝojo miksiĝas kun sento de spitemo kaj malamo kontraŭ la faŝistaj buĉistoj.



Jen estas tio kien la Usonaj agresantoj nomas "volonta reenpatriigo."

KURANTAJ AFEROJ

Unua Giganta Vapor-turbina Generatoro Fabrikata en Ŝanhajo

Giganta 6,000-kilovata vapor-turbina generatoro estas nun fabrikata, por la unua fojo en Ĉinio, en la ŝtataj povo- kaj elektro-maŝinaj fabrikoj en Ŝanhajo. Ĉiuj pecoj estas faritaj en Ĉinio. Tiu ĉi nova turbina generatoro povas liveri sufiĉe da elektro-povo por tri grandaj teksejoj aŭ sufiĉe da lumo por urbo kun kvarono de miliono da loĝantoj.

La fabrikado de tiu ĉi vapor-turbina generatoro montras la progreson de ĉina elektra industrio. Lastjare la Ŝanhaja Elektro-maŝina Fabriko povis produkti nur 300-kilovatajn generatorojn.

Tiu ĉi rapida disvolviĝo en la pasinta unu jaro estis ebla pro la helpo de Ĉeĥoslovakio, kiu liveris la desegnojn kaj ĉefan ekipaĵon por fabriki tiun ĉi novan turbin-generatoron. Ĝi ankaŭ sendis kvin specialistojn por helpi al la fabrikado.

Post la sukceso de la fabrikado de tiu ĉi nova generatoro, pli multaj estos produktataj. Novaj kaj pligrandigitaj fabrikdomoj necesaj por la fabrikado de tiaj generatoroj estas planitaj kaj estos konstruataj en

venonta printempo. Parto de la necesa ekipaĵo de maŝinoj por la novaj kaj grandigitaj fabrikdomoj jam alvenis de la Popolaj Demokratioj.

Tibetanoj Celebras Riĉan Rikolton

Tibetaj kamparanoj de la okcidenta antaŭurbo de Lhasa okazigis tradician kunvenon de rajda-arkpafa konkurso en la 29a de aŭgusto por celebri ĉijaran riĉan rikolton, la plej bonan rikolton dum multaj jaroj.

Dekoj da kamparano-konkursantoj el proksimaj vilaĝoj partoprenis, vekante ŝtorman aplaŭdon kiam ili pretergalopis, kun kaskoj kaj kirasoj laŭ la antikva stilo kaj portante pafarkojn, sagojn kaj lancojn. La herbejo laŭlonge de Lhasa-rivero, kie multaj tendoj estis starigitaj por tiu okazo, estis plena de ridantaj kaj krientaj kamparanoj en siaj plej belaj vestoj. La laborantaro de la farmoj de la Popola Liberiga Armeo en Tibeto estis invitata partopreni en la celebrazo.

La programo daŭris kvar horojn. Ĉiuj konkursantoj ricevis "Hada"-ojn, tradiciajn silkajn skarpojn, prezentitajn de fraŭlinoj kaj la ĉefoj kiuj direktis la kunvenon, kaj estis regalitaj per la plej bona hordea vino.

La Baŭĝji-Ĉengtu-a Fervojo—

Nova Arterio en la Interno de Ĉinio

Jen Feng

La Baŭĝji-Ĉengtu-a Fervojo—alia nova arterio dank' al kiu la riĉa Sudokcidento pli bone kunligiĝos kun la aliaj regionoj de Ĉinio—estas nun sub streĉa konstruado. Havante sian starto-stacion ĉe Ĉengtu en la Sudokcidento, tiu ĉi fervojo iras el la ebena de okcidenta Seĉuan-provinco; ĝi transiras la rapide fluantajn riverojn Tŭo, Pej kaj Ĝjaling, kiuj elfluas el gorĝoj de altaj montoj, kaj la Daba-montaron kaj la pasejon Janmenba inter nubskrapaj montpintoj, natura fortikaĵo de Seĉuan; ĝi malsupreniras laŭ la du mil metrojn alta Ĉinling-montaro, transiras Ŝej-riveron en Ŝensi-provinco kaj venas al sia finstacio Baŭĝji sur la Lung-Haj-a Fervojo. Entute ĝi longas je pli ol okcent kilometroj.

La konstruado de la Baŭĝji-Ĉengtu-a Fervojo komenciĝis je la unua de julio, 1952. La sekcio nun konstruata estas la suda, t.e. la kvarcent kvindek ok kilometrojn longa parto de Ĉengtu, Seĉuan-provinco ĝis Ljojang, Ŝensi-provinco. Laŭplane la tuta linio finkonstruiĝos kaj malfermiĝos al trafiko en 1957, la lasta jaro de la unua kvinjara plano de Ĉinio.

Per la kompletigo de tiu ĉi fervojo, la Ĉengtu-Ĉungking-a Fervojo kunligiĝos kun la Lung-Haj-a


Fervojo, kiu komenciĝas ĉe Ljanjungang sur la bordo de la Orienta Maro, trapasas la ebenaĵon de centra Ĉinio kaj finiĝas ĉe Lanĉou, tiel ke la ĉefaj fervoj-linioj en la sudokcidenta, la nordokcidenta kaj centra Ĉinio formos grandan fervoj-reton. La formiĝo kaj etendiĝo de tiu ĉi reto ekonomie antaŭenpuŝos vigran interŝanĝon de produktaĵoj inter diversaj regionoj, ebligos pli sisteman utiligon de la riĉfontoj de la tuta lando, kaj pli racian distribuon de industria kaj agrikultura produktado laŭ la unueca, longdaŭra konstru-plano de la lando; kaj politike ĝi plifortigos la solidarecon inter la diversaj nacioj en la tuta lando.

La konstruado de la Baŭĝji-Ĉengtu-a Fervojo estas entrepreno tre granda kaj malfacilega. La reakciaj regantoj de malnova Ĉinio jam plurfoje faris esploron kaj preparon por ĝia konstruo, sed pro tio, ke la linio devas trapasi Ĉinling-montaron kiu estas du mil metrojn alta super la marnivelo, kaj postulas ege komplikajn laborojn kaj multegan elspezon, ili ĉiufoje malsukcesis.

En 1950, ne longe post la fondiĝo de nova Ĉinio, kiam la financo kaj ekonomio ankoraŭ ne atingis perfektan stabilecon, la Fervoja Ministerio de la Centra Popola Registaro jam asignis monsumon el la ŝtata kaso por komenci la projekton de la konstruado de tiu ĉi fervojo. En junio de la sama jaro, la Fervoja Ministerio sendis du esplorajn grupojn konsistantajn el pli ol mil teknikistoj kaj aliaj laborantoj por komenci la esploran laboron de la Tjanŝuj-Ĉengtu-a Fervojo.* Por pli bona esplorado, stariĝis en marto de 1951 Komitato por la Linio-elektado de la Suda Sekcio de la Tjanŝuj-Ĉengtu-a Fervojo kiu sukcesis trovi novan linion tridek unu kilometrojn pli mallongan ol tiu elektita en 1950 kaj samtempe eviti pli ol dek grandegajn konstrulaborojn kaj la prilaboron de 5,800,000 kubaj metroj da tero kaj ŝtono—laŭ antaŭkalkulo, tio ŝparos entute 1,200,000,000,000 yuan-ojn.


Je la unua de julio, 1952, okaze de la ekfunkcio de la Ĉengtu-Ĉungking-a Fervojo, Prezidanto Maŭ Ze-tung proklamis la instrukcion: "Celebru la ekfunkcion de la Ĉengtu-Ĉungking-a Fervojo; sekvigu tion per la konstruo de la Tjanŝuj-Ĉengtu-a Fervojo", kaj la revo de tridek kelkaj jaroj de la popolo en la Sudokcidento finfine komencis realiĝi.

Estas imageble, kiel granda kaj malfacila estas la konstrua laboro de fervojo en regiono kun multaj montoj kaj rapide fluaj riveroj. Nur ĉe la suda sekcio nun sub konstruado, kiu etendiĝas 458 kilometrojn de Ĉengtu ĝis Ljojang, jam necesas konstrui pli ol duoble tiom da tuneloj kiom troviĝas sur la tuta linio de la Ĉengtu-Ĉungking-a Fervojo. La meznombra kvanto de terkaj ŝton-laboro bezonata por la konstruo de ĉiu kilometro de tiu ĉi fervojo preskaŭ dekoblas tiom kiom por la Pekin-Hankoŭ-a Fervojo.



Pli ol unu kilometron longa tunelo sur la suda sekcio de la Baŭĝji-Ĉengtu-a Fervojo en konstruado.

Sed per sia heroo laboro nia liberi-gita popolo konkeras egajn malfacilaĵojn por la konstruado de la patrolando. Sub la granda alvoko de Prezidanto Maŭ, miloj kaj dekmiloj da veteranaj batalantoj de la Fervoja Korpuso de la Ĉina Popola Liberiga Armeo iris al la konstruejoj kiel avangardoj, kaj ilin sekvis kelkdek miloj da laboristoj, kiuj jam triumfe finkonstruis la Ĉengtu-Ĉungking-an Fervojon. La laboristoj solene ĵuris sian partoprenon al la konstruado, marŝis al la altaj montoj kaj mallargaj valoj, kaj ekfaris batalon kontraŭ la miljaraj rokmuregoj kune kun la Ĉina Popola Liberiga Armeo.



Fer-betona ponto konstruiĝas sur Ĉingbaj-rivero.

Inter la montoj kaj riveroj de Ĉengtu ĝis Ljojang, rokegoj estas tondre atakataj per dinamito; en mallargaj valoj palis-enbataj maŝinoj el Sovetunio bruegas tage kaj nokte; pumpiloj ĉe la ponto-fundamentoj kaj en la tuncloj elpumpadas neĝblankan ŝaŭmantan akvon kaj ĉie vibras arda labor-entuziasmo kaj sonas ĝojaj kantoj.

Je la 17a de septembro tiuj ĉi herooj jam finkonstruis la sektion de Ĉengtu ĝis Mjanjang, kies longeco estas 14.7 procentoj de la tuta linio, kaj oni decidis ĝin malfermi al trafiko je la Nacia Festo, la 1-a de Oktobro, 1953.

La konstruado de la Baŭĝji-Ĉengtu-a Fervojo estas fervore subtenata de la popolanoj de la Sudokcidento, precipe tiuj de Seĉuan-provinco, kiuj, je la komenco de la laboro, ĝojege informis unu la alian: "Prezidanto Maŭ alsendis homojn konstrui fervojon por ni!" La loĝantoj laŭlonge de la linio faris konkretajn planojn por helpi al la konstruado. La kamparanoj de dek kelkaj gubernioj volonte sin organizis por trovi loĝejojn, transporti materialojn kaj manĝaĵojn por la batalanto-kaj civilulo-laboristoj. La minoritataj nacioj tie loĝantaj alportis siajn akvo-radojn por kune kun la pumpiloj forigi la akvon de mont-riveretoj kaj tiel garantii facilan plenumon de beton-metado. La transportaj grupoj de kamparanoj por akiri kaj liveri reltrabojn iris en vico kelkajn kilometrojn longa. "Kien la fervojo atingos, tien ankaŭ ni!"—jen ilia slogano.

La popolanoj de la Sudokcidento fervore subtenas la konstruadon de la fervojo, ĉar ĝi alportos feliĉon al la preskaŭ cent milionoj da popolanoj de la kvar provincoj en tiu regiono. Ekzemple, en Seĉuan-provinco, kiu estas ofte nomata "la Ĉiela Lando", riĉaj estas la subteraj trezoroj kaj la agrikulturaj produktaĵoj, kaj krome produktiĝas tie multaj specoj de lokaj produktaĵoj. Ili certe havas multe pli grandan merkaton, kiam modernaj komunikiloj estos utiligataj.

La finkonstruiĝo de la Baŭĝji-Ĉengtu-a Fervojo ankaŭ multe kontribuos al la disvolviĝo de la industrio de Ĉinio. Pere de la fervojo, maŝinaj ekipaĵoj povos esti transportataj de ĉiuj aliaj partoj de Ĉinio al la Sudokcidento por elfosi la subterajn trezorojn, kaj utiligante la lokajn riĉajn materialojn kaj la neelĉerpeblan akvo-forton de Ĝjaling-rivero oni povos disvolvi la kemiajn industriojn de alkoholo, sterko ktp. kaj aliajn industriojn kiel ledan, tabakan k.a., kaj la vastaj virgaj arbaroj povos esti utiligataj por konstruado kaj

paper-farado. La fervojo ankaŭ elportos la gravajn produktaĵojn de la Sudokcidento por subteni konstruadon en diversaj aliaj partoj de Ĉinio.

La Sudokcidenta popolo kiu antaŭe dependis de ŝarĝbestoj, ligno-boatoj kaj malgranda nombro da aŭtomobiloj por transportado, finkonstruis la Ĉengtu-Ĉungking-an Fervojon en tri jaroj post la liberiĝo, kaj jam komencis konstrui la Baŭĝji-Ĉengtu-an Fervojon. La funkciigo de la antaŭa jam alportis al tiu regiono senprecedencan prosperiĝon; estas imageble, ke kun la kompletigo de la Baŭĝji-Ĉengtu-a Fervojo la aspekto de la Sudokcidento ege ŝanĝiĝos.

** Laŭ la malnova plano, la linio devas finiĝi ĉe Tjanŝuj. La nova linio prenos Baŭĝji-n kiel sian finstacion kaj tiamaniere mallongigos la distancon inter la Sudokcidento kaj Orienta Ĉinio.*

Kurantaj Aferoj

Fervojo Atingis Tibetanan Regionon en Nordokcidento

La nun konstruata Lanĉoŭ-Sinkiang-a Fervojo jam atingis la Tjanĝu-an Tibetanan Aŭtonoman Regionon, 132 kilometrojn for de Lanĉoŭ, la startpunkto de la fervojo. La tibetanoj tieaj estas preparantaj por bonvenigi la unuan vagonaron.

Granda ĉevalo-konkurso estas parto de la programo en preparado.

Depost kiam la Tjanŝuj-Lanĉoŭ-a Fervojo atingis Lanĉoŭ'n en lasta oktobro, la popolo de la tibetana regiono jam trovis pli kaj pli grandajn elirejojn por siaj produktaĵoj, kaj ili jam povis aĉeti manufakturaĵojn je multe pli malaltaj prezoj ol antaŭe. Lano, la ĉefa fonto de enspezo, nun vendiĝas je dekoble pli alta prezo ol antaŭ la liberiĝo, se oni komparas ĝin kun tia enportata necesajo kia briketo.

La Tjanĝu-a Tibetana Aŭtonoma Regiono establiĝis antaŭ tri jaroj. Nun ĝi havas loĝantaron de 56,000. Dank' al la plibonigitaj bredaj metodoj, kiujn enkondukis la Popola Registaro, la nombro de ŝafoj jam pligrandiĝis de 40,000 ĝis 130,000 dum tri jaroj. Troviĝas nun 56 lernejoj en la regiono.



**Per ĉiam pli multaj
kaj pli bonkvalitaj
ŝtalaj reloj la Ĉung-
king-a ŝtal-fabriko
provizas la nove kon-
struatajn fervojojn.**

Hanjeping: Levigo kaj Subiro

En 1890, la fabriko estis fondita en Hanjang, parto de la urbotrio Uhan (Uĉang-Hankoŭ-Hanĵang) ĉe la kunfluejo de la riveroj Jangzi kaj Han. Ĝang Ĝi-dung mem elektis la sidlokon: li volis ke li povu vidi la fumantajn kamentubojn el la fenestro de sia domo. Estis karakteriza por tiu tempo, ke lia opinio venkis super tiuj de la inĝenieroj kiuj avertis ke la grundo estas tro malkompakta. Fakte pruvis ke la inĝenieroj pravas. Ĝus kiam la unua

Malnovaj fabrikoj, kiel maljunuloj, laboras kun junula produktivo en hodiaŭa Ĉinio. Inter ili estas ŝtal-fabriko en Ĉungking, sur la supra parto de Jangzi-rivero, kiu estis starigita dum la Manĉua Dinastio kaj estis iam kondamnita kiel rubo. Ĝi estas ja respektinda "Avo" kompare kun la nova aŭtomata ŝtal-prema fabriko konstruata ĉe Anĉan en la Nordoriento. Tamen, ĉi tiu "avo" faris pli multe depost la liberiĝo ol dum sia tuta pasinta vivo. Notinde estas ke ĝi provizis ĉiujn relojn kaj multajn aliajn ŝtal-instalaciojn al la pli ol 505 kilometrojn longa Ĉengtu-Ĉungking-a Fervojo konstruata en 1950-52.

La Songo de la Generalo-gubernatoro

En la lasta parto de la dekaŭa jarcento, imperiismo sin trudis pli kaj pli profunden en Ĉinion. Tio incitis la ĉinan popolon fari reziston kaj vidigis al ili la neceson reformi la politikon kaj fortiĝi la ekonomion de sia lando. Samtempe multaj oficistoj de la Manĉua Imperio ankaŭ interesiĝis pri moderna transport- kaj milit-industrio. Kompreneble ilia celo ne estis demokratigi politikon sed armi kaj defendi la imperian registaron kaj reakcian soci-ordon, kiel oni faris dum la sama periodo en Japanio. Krome, ili trovis en tio ŝancon por havigi al si personan profiton.

Ĝang Ĝi-dung (1837-1909) estis unu el la plej eminentaj oficistoj de tiu ĉi tipo. En 1884-89, kiam li estis Generalo-gubernatoro de la provincoj Kuangtung kaj Kuangsi, li kolektis monon el privataj fontoj kaj mendis el Britlando maŝinojn por ŝtal-prema kaj aliaj fabrikoj. La fabriko, la sama kiu nun funkcias en Ĉungking, ne estis starigita en suda Ĉinio. Ĝang Ĝi-dung estis transigita kaj lia sekvento ne apartenis al la "moderna" skolo. Rezulte de tio, la tuta maŝinaro transportiĝis al centra Ĉinio, kie Ĝang tiutempe fariĝis Generalo-gubernatoro de la provincoj Hunan kaj Hupej.

100-tuna fornego estis konstruita, la fundamento ekmoviĝis malsupren. La du aliaj pli grandaj fornegoj, kiuj ankoraŭ restis neinstalitaj, estis starigitaj ĉe Daje, proksime en la sudoriento.

Kunportante la fabrikon kun si al sia nova regiono, la obstina generalo-gubernatoro ne pensis pri la provizo de fer-mineralo kaj karbo. Tial nenia laboro estis farebla ĝis kvar jarojn poste, kiam Ŝeng Ŝjŭan-hŭaj, alia oficisto, malfermis fer-minon ĉe Daje. Tamen, eĉ tiam ne estis koakso en Ĉinio kaj la unua fandado estis plenumita per koakso importita el Britlando! Pli poste, koakso estis alportita el la Britlandposedataj karb-minoj ĉe Kajping, en norda Ĉinio. Sed tio ankoraŭ signifis ke la kvanto kaj prezo de la produkto de tiu fabriko estis sub fremdlanda regado. La problemo ne solviĝis ĝis Ŝeng Ŝjŭan-hŭaj komencis ekspluati bonan mol-karban minon en Pingŝjang, Kiangsi-provinco.

En 1908 la diversaj proprajoj estis kunigitaj en Hanĵang-Daje-Pingŝjang-a Karb- kaj Fer-Kompanio, kies nomo estas ofte mallongigita kiel Hanĵeping-a Kompanio. Ĉar la Manĉua Registaro estis tro avara kaj miopa kaj ne financis tian entreprenon, la akcioj iris al privataj kapitalistoj. La nova kompanio klopodis pri karb-minado, ferfandado kaj ŝtal-hardado kaj -premado. Ĝi ankaŭ funkciigis fervojo- kaj ŝipo-transportadon. Dum tiu periodo ĝi estis la plej granda industria entrepreno ne nur en Ĉinio sed ankaŭ en la tuta Malproksima Oriento.

Kvankam Hanĵeping estis granda, ĝi ne povis funkcii en la cirkonstancoj de duon-kolonia kaj duon-feŭdisma Ĉinio. La solaj reloj kiujn ĝi produktis estis tiuj de la Pekin-Hankoŭ-a Fervojo, kies direktoro Ŝeng Ŝjŭan-hŭaj ankaŭ estis ĝia estro. Aliaj fervojoj tiam konstruataj estis limigitaj de kontraktoj de fremdlandaj monpruntoj, kun la kondiĉo ke reloj kaj aliaj ŝtal-produktaĵoj devis esti importataj el la pruntodona lando.




Klopuo por Plenumi kaj Superplenumi la Nacian Konstruan Planon!

Afiŝo pentrita de Ju Jun-ĝje




Konstruado de la dua aŭtomata blovforno, la Blovforno N-ro 7 de la Feraŝtala Kompanio de Anŝan.

Instalado
suker-raf




Parto de nove konstruita sinteza benzin-ekstraktejo en Fuŝun, Nordorienta Ĉinio.





UNUAJ PROJ KVINJAJ

Post la sukcesa kompletigo d
lanĉis en 1953 sian unuan k
struado, kiu kondukos al la
estos konstruitaj aŭ rekonstrui
rapida antaŭenmarŝo ekeron
neapartigebla de la malegoism
en tekniko kaj ekipaĵoj de l

Konstruado de la Lanĉoŝ-Sinkiang-a Fervojo, unu el la dek novaj linioj konstruataj ĉijare.




de ekipaĵoj en ŝtata
inejo en Zini, Kuang-
tung-provinco.




Tiu ĉi peza
ŝtalpremejo de la
Fera-ŝtala Kom-
panio de Anŝan
kompletigos en
tiu ĉi vintro.

EFKTOJ DE ĈINA RA PLANO

de ekonomia restarigo, popola Ĉinio
vinjaran planon de ekonomia kon-
industriigo de la lando. Ĉi-jare
taj multaj gravaj industrioj. La
ria de nova Ĉinio estas
a helpo fare de Sovetio
leĵ moderna tipo.



Elektro-maŝina fabriko konstruata en Harbi
Nordorienta Ĉinio.



Sovetia specialisto
helpas konstruan-
tojn de elektrejo
en Gengĝou,
Honan-provinco.

Fundamento-fosado por la unua ĉina aŭtomo-
bilo-fabriko. *Supre maldekstre:* Konstruado
de la propra beton-preparejo de tiu konstruejo






Ĉiuj ĉi tiuj modernaj maŝinoj en la nova ŝtata Koton-teksejo de Uhan estas fabrikitaj en Ĉinio.



La unua aŭtomata fervoj-inspekta vagonaro fabrikita en Ĉinio de la Fervoja Riparejo de Tangŝan.

Novaj Produktaĵoj de Ĉina Industrio

La sukcesoj de nova Ĉinio en ekonomia konstruado jam donis certan antaŭenpuŝon al la masin-fabriko industrio. Novtipaj ekipaĵoj, kiujn la malforta duonkolonia industrio de malnova Ĉinio ne povis fabrikii, estas produktataj. I tie montriĝas kelkaj el la novaj produktaĵoj de ĉinaj laboristoj.



Helpe de Sovetiaj specialistoj, laboristoj de iu fabriko en Ŝenjang (Mukden) produktis tiun ĉi unuan Ĉinio-faritan 10,000-kilovatan transformatoron.



Laboristoj de Kajĵŭan-Maŝinfabriko en Uŝĵi, Kiangsu-provinco, muntas 13-futajn tornilojn, la unuajn de ĉi tiu tipo iam faritajn en Ĉinio.

La faligo de la Manĉua Dinastio en 1911 ne plibonigis la staton de la aferoj. Fakte fariĝis eĉ pli malbone. La militistoj kiuj uzurpis la regpotencon de la "respubliko" estis tiel koruptaj kaj malfortaj ke ili permesis partoprenon en la administrado al la japanaj akciuloj. La ŝtalprema fabriko ĉesigis sian laboron kaj Hanĵeping faris nenion alian ol vendi fer-mineralon kaj fandferon al Japanio.

Popola Heroeco; Kuomintanga Sabotado

La situacio malmulte ŝanĝiĝis ĝis kiam okazis la rezista milito kontraŭ la japana imperiismo en 1937. La tuta nacio decidis rezisti la invadanton kaj multaj naciaj kapitalistoj konsentis translokigi siajn fabrikojn al la montoza okcidento. Per heroaj penoj la Hanĵang-aj laboristoj transportis la ŝtal-preman fabrikon, blov-fornegojn kaj aliajn maŝinojn al Ĉungking kiu situas 1,370 kilometrojn for sur la supra parto de Jangzi-rivero. Ĉar ne disponeblis sufiĉe da vaporŝipoj, la ekipaĵoj estis malmuntitaj kaj portitaj per centoj da lignaj jonkoj el kiuj neniu povis teni pli ol dek tunojn. Veturante tra la danĝeraj rivergorgoj jen unu kaj jen alia jonko renversiĝis. Sed ĉiufoje la laboristoj kaj jonkistoj savis la kargon el la rivero.


Finfine la fabriko estis denove starigita. Karbmino kaj koaksofornoj estis malfermitaj en najbaraj lokoj kaj komenciĝis ŝtal-fabrikado—la unuan fojon en multaj jaroj.

Post la japana atako ĉe Perlo-haveno kaj Usona partopreno en la milito, tamen, la situacio denove ŝanĝiĝis. Usonaj specialistoj venintaj kun milit-produkta misio kaj estrataj de Donald Nelson malestimis tiun malnovan fabrikan kaj rigardis ĝin kiel malmoderan, neekonomian kaj forjetindan. Por la komuna profito de Usonaj kompanioj kaj Kuomintang-aj oficistoj, ŝtalo estis importita el Usono kaj transportita per la sola vojo tiam ebla—per aero! Se Ĉinio volas premi ŝtalon—diris la usonanoj—ĝi devas atendi ĝis la fino de la milito kiam novaj ekipaĵoj estos aĉeteblaj el Usono. Estis tia afero kiu reduktis ĉinan nacian industrian al ruino antaŭ kaj post la venko super Japanio.

Vekigo kaj Renaskiĝo

Poste venis la liberiĝo. En la printempo de 1950, la Popola Registaro refunkciigis la fabrikan. Por certigi ĝian labor-povon, Sovetiaj specialistoj estis invigitaj por ĝin kontroli. Ili opiniis la fabrikan "unu el la trezoroj de Ĉinio", rimarkigante ke kvankam ĝi estas malnova, ĝi ne estas multe uzita kaj povas funkcii por dudek pluaj jaroj. Krome ili donis la konsilon instali novan ŝtalvarmigan fornegon por utiligi la plenan kapablon de la fabriko kaj plialtigi la produkto-kvanton.

Kuraĝigite de tiu juĝo de la specialistoj, la teknikistoj kaj laboristoj baldaŭ reirigis la laborojn. La mendo por la Ĉengtu-Ĉungking-a Fervojo estis akceptata kiel defio. Konservativaj inĝenieroj kiuj diris ke oni bezonas "minimume ok jarojn por plenumi la mendon" estis persvaditaj revizii sian opinion, ne nur per argumento sed ankaŭ per diversaj novaj reformoj proponitaj de laboristoj kaj teknikistoj. Rezulte de tio, la fervoja ekipaĵo estis finfabrikita antaŭ la tem-



Blovforno de la ŝtalfabriko en produktado.

polimo. Hodiaŭ la fabriko provizas per siaj produktoj aliajn fervojojn kaj konstru-lokojn. Ĝi ludas gravan rolon en la nuna kvinjara plano.

Milionoj da ĉinaj popolanoj hodiaŭ scias la historion. Ĝi disvastiĝis pere de ĵurnaloj kaj inspiris literaturajn verkistojn. Teatraĵo pri tiu temo, titolita "Kvardekjara Espero", estas unu el la plej popularaj en urbaj teatroj.

Kiel la sola ŝtal-prema fabriko de Ĉinio paraliziĝis dum jardekoj pro la duon-kolonia kaj duon-feŭdisma pozicio de la lando kaj kiel ĝi reviviĝis sub la nova demokratio—jen estas leciono por la ĉinoj kaj aliaj popoloj. Tio pruvas ke eĉ la grandaj penoj de teknikistoj kaj industriaj organizantoj ne povas estigi progreson se ili estas ĉirkaŭbarataj de arkaika soci-sistemo—kaj ke nenio estas nerealegebla en lando kiu akiris sendependecon kaj kie la laboranta popolo regas por si mem.

Kurantaj Aferoj

Grandega Monumento en Konstruado

Grandega peco da granito, kiu pezas 103 tunojn, estas survoje de Cingtaŭ al Pekino. Ĝi estos uzata por la masiva cenotafo, kiu estas konstruata sur la Tjan'an-men-placo, por rememorigi la naciajn martirojn falintajn en la pasintaj cent jaroj de revoluciaj bataloj.

La konstruado de la monumento komenciĝis la 1-an de aŭgusto de lasta jaro, la 25an datrevenon de la fondiĝo de la Popola Liberiga Armeo. Kiam la tuta monumento estos finkonstruita ĝi altas je 36.5 metroj kaj pezos je 10,000 tunoj.

Printempo en la Maŝinejo

Tang Ke-sin

—laboristo de la Ŝanhaja Sesa Ŝtata Koton-teksejo—

En la pasinteco, ni teksistoj preferis vintron ol someron. Tio ne signifas, ke ni havis sufiĉe da vestoj estante teksistoj. Ne. Malnova proverbo diras: "En la domo de ĉarpentisto ne troviĝas sojlo." En la malnova socio, ni estis nur vivaj maŝinoj de la burokrataj kapitalistoj. Ni ne ŝatis la someron tial, ke la somero tiutempe efektive multe suferigis nin teksistojn.

Ni prenu la teks-maŝinejon kiel ekzemplon.

Tiutempe, la teks-maŝinejo estis kvazaŭ granda kesto aŭ "vaporumilo". En la tuta jaro, tie konstante ŝvebadis blanka nebulo. Dum somero la temperaturo ĝenerale altiĝis ĝis proksimume 100 gradoj F. La aero, saturita per grandkvanto da amelpulvoro kaj flugantaj koton-fibro, estis malpura kiel stagnanta akvo en haladza lageto kaj oni spiris malfacile la tutan tagon. Tie ankaŭ troviĝis fenestroj, sed ili estis tiel malgrandaj kiel vizitkartoj. Eĉ tiajn fenestretojn malfermi estis malpermesate. Se la fenestroj estus malfermitaj kaj enlasus sekan aeron, kaj kaŭze de tio multigus la fadenrompiĝoj kaj malmultiĝus la produktaĵoj, ĉu vi povus tion prirespondi? Al la burokrataj kapitalistoj, la laboristoj ja valoris nenion. La kapitalistoj diris: "Se maŝino difektiĝas, ni devas aĉeti per mono; se laboristo mortas, venos alia vivanta." La laboristoj ĉiutage laboris dekkelkajn horojn, kun piedoj kaj manoj senĉese moviĝantaj kiel maŝino. De mateno ĝis vespero, ŝvito senfine elfluis kvazaŭ fonto sur monto, kiu neniam elĉerpiĝas. Post la tuttaga laboro, ni revenis hejmen kun kapo peza kaj turniĝanta, kaj ni volis nek manĝon, nek ion alian sed tuj ekfalis sur la liton. La sekvantan tagon, ni denove trenis al la fabriko la kruojn pezajn je centoj da kilogramoj, kaj alproksimiĝinte al la pordo de la maŝinejo ni eksentis korkuntiriĝon, tamen ni devis eniri kunpremante la dentojn.

* * *

Post la liberigo, la fabriko iris en la manojn de nova mastro, kiu estas neniu alia ol ni laboristoj mem.

Ni ne plu estas alies viva maŝino nek plu laboras por havigi al aliuloj luksan domon kaj manĝon. Por konstrui la patrimon kaj plibonigi la vivon, ni devas plialtigi la produkton. Ni ne devas plu labori en tia "vaporumilo" kiel antaŭe; ni devas elpensi rimedon kontraŭ tio.


Tamen nia Prezidanto Maŭ prizorgas nin pli atente ol ni mem—tage kaj nokte li pensas pri niaj aferoj. En la pasinta jaro li jam donis ordonon, ke la temperaturo en teks-maŝinejo ne devas esti super 96 gradoj F., kaj tiu en ŝpin-maŝinejo ne super 100 gradoj F. Sed post unu jaro li jam ne kontentis je tio, kaj ree ordonis, ke ĉijare la temperaturo en teks-maŝinejo ne devas esti super 92 gradoj F., kaj en ŝpin-maŝinejo ne super 98 gradoj F.

Tio ja ne estas afero simpla. Kiom la ŝtato elspezis en la lastaj du-tri jaroj por malaltigo de la temperaturo en teksejoj—tion mi ne scias; ni scias nur, ke sole en la pasinta jaro nia fabriko elspezis por tio jam pli ol 2,000 milionojn da juanoj!

En la somero de la pasinta jaro, la supera instanco asignis al nia fabriko pli ol 2,000 milionojn da juanoj por instalado de aermalvarmigaj aparatoj. La sumo nur sufiĉis por unu, sed estis varmege kaj en la teks-maŝinejo kaj en la ŝpin-maŝinejo. En kiu oni devis do unue instali? Fine, post detala esplorado la fabrikestro konkludis, ke oni devas unue ĝin instali en la ŝpin-maŝinejo, ĉar tie estas ankoraŭ pli varmege ol en la teks-maŝinejo. Sed la decido devas esti diskutata de ĉiuj por klarigi la kialon, alie oni dirus, ke la fabrikestro ne estas justa.

Dum la diskutado, efektive iuj el la teks-maŝinejo diris: "Jes, en la ŝpin-maŝinejo estas varmege, sed ĉe ni ankaŭ! Ili volas plialtigi la produkton, kaj ni ankaŭ volas! Kial oni instalos por ili sed ne por ni?" "Iu laboristino nomata Sansaŭzi (Tria Bofranjo), kiu estis la plej malfacile konvinkebla, diris: "Ni ĉiuj estas same homoj, se oni instalos, instalu por ambaŭ maŝinejoj!" La

La duonŝtata Uhan-ŝpinejo N-ro 1 instalis, krom endomaj malvarmigaj instalaĵoj, ankaŭ akvoŝprucilojn sur la tegmentoj por plibonigi la someran laborkondiĉon.



grupestro klarigis al ŝi: "Por la instalado por ambaŭ maŝinejoj ne estas sufiĉe da mono. Niaj nunaj financaj kondiĉoj ankoraŭ ne permesas al ni tion fari." Kaj la maŝinejestro diris: "En la teks-maŝinejo ni povas unue starigi kelkajn aerumilojn kaj turnigantajn nebulŝprucilojn."

Pasintjare, la temperaturo en la teks-maŝinejo ne superis 96 gradojn F. Kelkfoje, kiam la temperaturo ekatingis 96 gradojn, la maŝinejestro tuj telefonis al la fabrikestro, kaj la lasta diris: "Haltigu la maŝinojn por momento, kaj lasu la varman aeron eliri eksteren!" En tia okazo, oni denove bruis pri la instalado de aermalvarmiga aparato, kaj Sansaŭzi nepre kriis per raŭka voĉo: "Vidu, kiom ni perdos en la laboro per duonhora haltigo de la maŝinoj? Ĉu tio ne influas la produkton?"

* * *

En ĉijara printempo, kiam oni ankoraŭ portis drapajn vestojn, sur la granda placo en la fabriko oni starigis provizoran laborejon. Kaj kiam sur la placo aperis tuboj el ferlato, ni ekkomprenis: "Denove instaligos aermalvarmiga aparato!"

Meze de majo, la suno, kvazaŭ fajra bulo aspergita per gasoleno, pli kaj pli ardiĝis. La gelaboristoj maltrankviliĝis pro la reveno de la malfacile eltenblaj tagoj. Sed ĉi jaro ne estas sama kiel la pasintaj jaroj; ĝi estas la jaro de konstruado kaj plano, en kiu ĉiu minuto estas kara, kaj oni ne devas tiel ofte haltigi la funkciadon de la maŝinoj kiel en lasta jaro. Se la plano ne estus plenumita, la popolo demandus nin riproĉe: "Kiel vi miloj da personoj mastrumas tiun ĉi fabrikon?" Ĉu efektive eblos baldaŭ fininstalo de aermalvarmiga aparato? La instal-laboristoj de la aermalvarmiga aparato garantiis dirante: "Ĉijare, la varmego ne plu turmentos vin, estu trankvilaj, ni nepre antaŭkuros la someron!"

Iuvespere en la komenco de junio, la lasta ŝraŭbo estis fiksita sur la aermalvarmiga aparato en la teks-maŝinejo.

Antaŭtagmeze en la sekvinta tago, la sekretario de la partia komitato, la fabrikestro kaj la prezidanto de la laborista sindikato ĉiuj venis al la teksmaŝinejon. Neniu el ili parolis, sed nur ridis al la gelaboristoj, kaj la gelaboristoj ankaŭ ridis al ili.

Je duono post la naŭa, la motoro de la ventsendilo komencis turniĝi. La akvopumpilo tondre bruis. Ruĝaj kaj verdaj silkkrubandoj ekflirtiĝis ĉe la aperturo de la venttubo, tra kiu la vento elŝprucis kunodoro propra al akvo kaj ankaŭ iom dolĉa. La aerumiloj sur la muroj ankaŭ turniĝis. La freŝa aero, filtrita per la akveroj en la ŝpruc-ĉelo senĉese enkondukigis en la maŝinejon tra la venttubo kaj estis denove elsendata de la aerumiloj.

La petolema Malgranda Ŭang kuris al Sansaŭzi kaj demandis: "Ĉu malvarmete aŭ ne?" Nun ŝi jam ĝojis el la tuta koro. Ŝi laboris kiel teksistino jam pli ol 30 jarojn. En la malnova socio ŝi laboris en fabrikoj japanaj, anglaj kaj ĉinaj. Tiam ŝi ofte pensis, ke en la teks-maŝinejo povus esti ne varmege, nur se la klimato radikale ŝanĝiĝus, t.e. se unu jaro konsistis el nur tri sezonoj: printempo, aŭtuno kaj vintro. Sed nun la klimato restas ne ŝanĝita, tamen la temperaturo en la maŝinejo ŝanĝiĝis. Ĵetinte straban rigardon al Malgranda Ŭang ŝi intence: "Ĉu malvarmete? Oni frostiĝus!"

Tiu ĉi antaŭe neniam okazinta nova afero alportis al ĉiuj diversajn ŝanĝojn en la vivo. Sur ĉies ĉultro vi ne plu povas trovi malsekan viŝtukon; vi ne plu povas vidi laboristinojn interpuŝigantaj ĉe la akvokrano por tordi tie la viŝtukojn; la teobareloj ĉiuj staras en ordo, neniam faligita de tiuj kiuj urĝe bezonis trinki; kaj al la teosendantoj ankaŭ neniu plu plendas pro la troa varmece aŭ nesufiĉo de la teo. En la ripoztempo post tagmanĝo, ĉe la ekstremo de la koridoro ne plu estas videbla granda amaso da homoj kiuj sin refreŝigas en malvarma aero. Ĉiutage oni volas iri pli frue al la laboro, pli frue en la maŝinejon.

* * *

Ni scias, ke nur sub la gvidado de la Komunista Partio ni povas krei feliĉan vivon, kaj ni plie scias per kio ni devas danki la Partion. Meze de junio la nova laborkonkuro jam disvolviĝis ĉiufanke en la tuta fabriko.

Du Infanoj en Longvojaĝa Vagonaro

Ŝi Ĝung-fang

Je la 11-a de septembro, mi veturis per vagonaro de Kantono al Hengjang. En la litvagono, mi vidis du infanojn, de neniuj parenco prizorgatajn. Kiel povas esti, ke du infanoj veturas longvojaĝe per si mem en vagonaro! Mi parolis kun ili pro zorgemo. La pli aĝa infano rakontis al mi sian historion.

La du infanoj estas fratoj. La pli granda estas naŭjara, nomata Lu Siaŭ-tu, kaj la pli juna estas sepjara, nomata Lu Vu-tu. Ilia patrino lernas en iu kontoscienca kurso en Kantono, dum la patro laboras en Ĝuejlin. La patrino intencis sendi la infanojn al la patro, sed, estus ne ekonomie ambaŭ mone kaj tempe, se ŝi mem ilin akompanus. Aŭdinte ke la laborantoj de la popola fervojo servas tre bone al la pasaĝeroj, ŝi decidis lasi la du infanojn veturi per si mem. Je la tago de la ekveturo, ŝi iris kun la infanoj al la stacio kaj aĉetis por ili biletojn. La litoj difinitaj al ili estis mezetaĝaj, sed kiam laboranto en stacio vidis ke la veturontoj estas du infanoj, li tuj klopodis interŝanĝi tiujn por du subetaĝaj. Krome, li ankaŭ skribis 'du atentigojn pri veturo' al la vagonarestro kaj Hengjang-stacio, kie la du infanoj devas ŝanĝi vagonaron, petante ilin multe prizorgi la du infanojn. Tion vidinte, la patrino hejmeniris trankvile, kaj la du infanoj ankaŭ tre ĝoje envagونيĝis.

En la vagono, la vagonaristoj trege prizorgis la infanojn, konigis al ili la regulojn, kiujn devas ober la veturantoj en la vagonaro, lasis ilin ludi gaje, kaj en la nokto metis kovrilojn sur ilin. Kiam ni atingis Hengjang-stacion, la vagonaro al Ĝuejlin ankoraŭ ne venis. Mi iom maltrankviliĝis, ke io neatendita okazus al la du infanoj kiam ili estas solaj en fremda loko. Sed la vagonaristo tre bone ilin prizorgis. Li kondukis ilin al la legejo de la stacio kaj akompanis ilin ludi pilkon. Li tiel igis ilin ludi gaje kaj libere.

La du infanoj certe jam atingis la patron sekure. Tion ekpensante, mi des pli sentas la grandecon kaj amindecon de la patrio.

Vilaĝa Patrin-infana San-centro

Gaŭ Ŝan

Kiam la somera suno leviĝis super la tegmenton de la Patrin-infana San-centro n-ro 4 starigita de la Pekina Municipala Registaro en Gaŭbejdjan, vilaĝo proksimume dek mejlojn oriente de Pekino, mi ekveturis kun juna akuŝistino Ĉen Ŝju-ĉjoŭ por ŝia regula rondiro. Ŝi kaj Ljoŭ Ŝjoŭ-ju, ŝia samlernejanino el Pekina Akuŝistina Lernejo, fiksitis regulon ĉirkaŭviziti almenaŭ dufoje ĉiumonate la 53 vilaĝojn kaj vilaĝetojn sub ŝia zorgo. Kun ŝia medicin-sako pendanta ĉe ŝia flanko, ŝi lerte biciklis sur la mallarĝa vojo inter tri-tikkampoj. Baldaŭ ni alvenis al Ĝuan'intang-vilaĝo.

"Ni eniru kaj rigardu la infaneton de Li Ŝjoŭ-jing."

Furioze bojis hundo kiam ni alvenis al la pordo. Vidinte nin, iu knabeto kaptis ĝin ĉe la kol-ĉeno kaj laŭte kriis, "Panjo, Onjo Ĉen venas vin viziti." S-ino Li, sunbrunigita, ridetante invitis nin en la ĉambron. Ŝi levis sian dikan, malgrandan infanon al Ĉen. "Diru 'dankojn' al la onjo kiu portis vin en la mondon." La grandaj okuloj de la infano ekbrilis. Tamen ĝi ankoraŭ ne povis paroli, ĝi nur etendis siajn molajn grasajn brakojn al Ĉen.

"Mia karuleto!" Ĉen prenis la infanon en siajn brakojn kaj kisis ĝin. Aŭdinte ke la fekaĵo de la infano estas iom tro seka, ŝi ŝerce diris al ĝi, "Kriu laŭte, mia dikuleto, se Panjo ne donas al vi lakton ĝustatempe aŭ ne donas al vi sufiĉe da akvo." La infano kapbalancis, kvazaŭ ĝi komprenus kion ŝi diris. Ni ĉiuj estis amuzitaj kaj eksplodis per ridego.

Dum la rondirado kiam ni pasis tra multaj vilaĝoj, la kamparanoj donis al mia akompanantino la plej amikajn salutojn. Kelkaj invitis ŝin halti por trinki tason da teo; iu maljunulino demandis ŝin kiam ŝi povos veni al ŝi kaj reekzameni ŝian bofilinon; iu prezidanto de la Demokrata Asocio de Virinoj diris al ŝi ke la vilaĝanoj volas ke la Ekspozicio pri Patrino kaj Infana Higieno reokazu, ĉar lastfoje ĝi fermiĝis tro frue. Multaj junaj virinoj varme bonvenigis ŝin kaj faris al ŝi multajn demandojn. Ŝi fiksitis datojn por antaŭnaskaj ekzamenoj al kelkaj kaj ekzamenis multajn aliajn.

Kurantaj Aferoj

Nova Aerlinio en Sinkiang

Nova aerlinio malfermiĝis en Sinkiang-provinco je la 1-a de septembro de la Ĉinia-Sovetia Civila Aervertura Korporacio.

Tiu ĉi linio kunligas Tihŭa'n, ĉefurbo de Sinkiang-provinco, kun la urboj Turfan, Kuĉe, Akosu kaj Kaŝgar (Ŝufu) kiuj situas en la okcidenta parto de la provinco. Kredeble tiu ĉi aerlinio multe kontribuos al la politika, ekonomia kaj kultura evoluo de tiu ĉi vasta landlima provinco, kiu estas sesono de la tuta areo de Ĉinio.

Ŝi respondis demandojn kaj donis konsilojn zorgeme kaj pacience. Evidente la kamparanoj tre respektis ŝian opinion.

"Mi vidas ke ĉiuj ŝatas vin ĉi tie kaj ke ili interesiĝas en via laboro." Mi gratulis ŝin kaj ŝian kolegon.

Ĉen skuis sian kapon ridetante, "Vi devas gratuli mian antaŭirinton Ĉjang Zi-ĉen. Ŝi metis la fundamenton por sukceso."

La Pioniro

Ĉjang Zi-ĉen, ĵus diplomita kaj avida pri atingajoj, estis sendita de la Buroo de Publika Higieno de la Pekina Municipala Registaro por malfermi la Patrin-infanan San-centron antaŭ du jaroj. Ŝi veturis al la vilaĝoj en ĉia ajn vetero, sed ŝian fervoron la vilaĝanoj renkontis nur kun indiferenteco, flegma ĝentileco kaj kelkfoje eĉ kun malamikeco. Subpremite kaj de malriĉeco ĉagrenite en la malnova socio kaj detenite for de edukado kaj scienco, la kamparanoj ankoraŭ nur kredis al la malnovaj kamparaj akuŝistinoj, malgraŭ ke iliaj neasepsitaj tondiloj kaj manoj ofte kaŭzis al triono aŭ pli de la novenaskitoj morton pro tetano.

Por popularigi modernajn akuŝigajn metodojn, la Popola Registaro donis instrukcion ke ĉiuj malnovaj akuŝistinoj devas esti retrejnataj. Al ili estis donita fundamenta scio pri la bezono de asepso. Al ili estis ankaŭ montrita la senceco de tiaj superstiĉaj kutimoj kiel malfermi ĉiujn pordojn kaj ĉrankojn se la akuŝado estas prokrastita, jam ne menciu la pli dangeŝajn praktikojn.

Kiam la malnovaj akuŝistinoj estis retrejnataj, necesaj ekipaĵo kaj medikamentoj estis donitaj aŭ venditaj al ili por ilia laboro. Juna Ĉjang supozis ke ili nun helpos ŝin popularigi la novajn metodojn de akuŝigo kiel eble plej rapide. Tamen ŝi senesperigis, ĉar la afero ne iris kiel ŝi atendis. Multaj gravedulinoj kaj iliaj bopatrinoj preferis sian propran manieron kaj multaj retrejnataj malnovaj kamparaj akuŝistinoj ĉanceliĝis returnen al la malnovaj metodoj.

Sed Ĉjang, kaj poste Ĉen Ŝju-ĉjoŭ kaj Ljoŭ Ŝjoŭ-ju, kiuj venis post kiam Ĉjang volontule iris al Koreio kiel flegistino, daŭre batalis kun la persisteco de veteranoj. Ili estis kuraĝigitaj de siaj kolegoj en aliaj patrin-infanaj san-centroj kaj la gvidantoj de la Higiena Buroo. La ideo "servi al la popolo" kiu estis al ili instruita en la Junulara Ligo kaj en la lernejo nun havis novan kaj devigan signifon. Ili simple ne volis cedi.

Ili ekkomprenis ke sen la konfido flanke de la kamparanoj, la popularigo de moderna akuŝig-metodo estas neefektivebla. Tial ili unue klopodis gajni la subtenon de la publikaj oficistoj de la vilaĝoj, precipe la prezidantoj de la filioj de la Demokrata Asocio de

Virinoj, organizo starigita por zorgi la rajtojn kaj interesojn de virinoj. La membroj de la Partio en la vilaĝoj, registaraj oficistoj kaj ĉiuj plej progresemaj vilaĝanoj subtenis ilin, kaj dank' al ilia helpo multaj kunvenoj de patrinoj kaj baldaŭaj patrinoj estis kunvokitaj. En ĉi tiuj kunvenoj ili klarigis helpe de ilustraĵoj kiel infano estas naskata, kial la malnovaj metodoj de akuŝigo estas danĝeraj kaj la novaj sendanĝeraj. Kvankam multaj pli aĝaj virinoj restis skeptikaj pri la scio de ĉi tiuj du junulinoj, tamen kelkaj junaj patrinoj volis provi la novajn metodojn. Li Ŝjoŭ-jing estis unu el ili.

Vivanta Pruvo

Estinte ĉiam de malriĉeco ĉagrenita kamparanino kiu ricevis teron post la liberigo, Li Ŝjoŭ-jing metis fidon sur personojn senditajn de la Popola Registaro. Sed sep el ŝiaj dek infanoj jam mortis pro tetano. Ĉu tiuj junaj knabinoj kun harplektaj povas akuŝigi ŝian dekunuan sendanĝere? Tiam ŝi rememoris ke la bienulo ĉiam sendis siajn gravedajn edzinojn kaj konkubinojn al la hospitalo kaj ili naskis siajn infanojn sendanĝere. Tiuj knabinoj estas trejnitaj en hospitalo! Krome, ili estas tiel afablaj kaj paciencaj. Ŝi decidis provi la novan metodon.

La tuta vilaĝo multe interesiĝis en ĉi tiu provo. Sekure ŝi naskis sian dekunuan infanon. La infano kreskis sana kaj vigla. Dume, ankaŭ la infanoj de pluraj aliaj patrinoj naskiĝis sekure sub la zorgo de la junaj akuŝistinoj Ĉen Ŝju-ĉjoŭ kaj Ljoŭ Ŝjoŭ-ju, kaj la kamparaj akuŝistinoj trejnitaj en la novaj metodoj. La modernaj metodoj de akuŝigo komencis akiri la konfidon de la vilaĝanoj.

Aŭskultante la interesan rakonton pri la batalo de la nova kontraŭ la malnova, ni baldaŭ atingis la pordon de la domo de Ju Ŝu-ĝjun en Gaŭĝing-vilaĝo. Lokite inter arboj kaj ĉirkaŭate de tritikkampoj, la nove riparita loĝejo de Ju estis pura kaj bonorda. Ŝi estis kudranta apud la larĝaj vitrofenestroj. Ŝia infano estis kviete dormanta sur la lito.

"Kiam Kamaradino Ĉen sciigis al mi ke oni devas min operacii pro la nenorma pozicio de mia infano, mi maltrankviligis kaj pri la infano kaj pri la elspezo," ŝi diris. "Sed fakte neniam maltrankvilo estis necesa. Nia Popola Registaro transportis min per malsanulaŭto al la hospitalo kaj pagis ĉiajn elspezojn de la operacio. Sen nia registaro kaj Kamaradino Ĉen, mi ne povus interparoli kun vi hodiaŭ." Tiuj patrinoj, kiuj, kiel Ju Ŝu-ĝjun, persone spertis la servon de la hospitalo, helpis propagandi la novajn metodojn multe pli efike ol dekduo da prelegoj.

Okaze de malfacila kazo, ili konsilas la estontan patrinon, "Kial ne iri al hospitalo? Se vi povas pagi nur parton de la kosto, la registaro pagos la restaĵon. Se vi ne povas, la registaro postulas de vi nenion!" Se iu ne povas pagi la koston por akuŝistino (15,000 juanoj, kiuj egalvaloras ĉirkaŭ la koston de du paroj da bonkvalitaj duonŝtrumpoj), ŝi povas ricevi la servon ankaŭ senpage. Telefonvoko venigos ambulancan al ĉiu ajn vilaĝo en unu horo.

Dum la lastaj du kaj duona jaroj, el la preskaŭ mil novnaskitoj, nur unu mortis pro tetano, kvankam ĉi tiu

malsano estis la kaŭzo de 20 ĝis pli ol 30 procentoj de infana morto antaŭ la liberigo.

Kiam ni revenis al la Patrin-infana San-centro n-ro 4, Ĉen Ŝju-ĉjoŭ, karesante sian biciklon kiel rajdisto sian favoran ĉevalon, ekkriis pri ĝia utileco al ŝi, "Tage aŭ nokte, ĝi ĉiam portas min kien ajn mi estas bezonata."

Interne, ni renkontis Hu Ju-jing, loka kampara akuŝistino, al kiu estis donita premio pro ŝia atenta zorgo pri estontaj patrinoj kaj ŝia fervoro kaj kapablo enkonduki metodojn de moderna akuŝigo. Ŝi demandis Ĉen, "Ĉu ni daŭre studos la metodon de sendolora akuŝo en la venonta klaso?" Ĉi tiu kapabla-aspektanta virino, nun registrita kampara akuŝistino, daŭrigas sian studon kun aliaj kamparaj akuŝistinoj sub la gvido de la Centro.

Ŝi ŝatas sian krom-profesion ne nur ĉar ĝi havigas al ŝi iom da aldona enspezo kaj popularan estimon, sed ankaŭ ĉar ĝi donas al ŝi la plezuron helpi alporti feliĉajn infanojn en la mondon.

Kiam Ĉen kaj Ljoŭ estis interparolantaj kun la kampara akuŝistino, mi rimarkis multajn bone foliumitajn librojn stapligitajn sur iliaj skribotabloj, inkluzive tiun nomatan *Akuŝigo en la Vilaĝoj de Sovetunio*.

La Patrin-infana San-centro n-ro 4 estas nur unu el la sep patrin-infanaj san-centroj en la orienta antaŭurba distrikto de Pekino. Ĝi estas tipo de la reto de tiaj centroj kreskantaj ne nur ĉirkaŭ Pekino, sed ankaŭ tra tuta Ĉinio. Nun troviĝas pli ol tridek mil patrin-infanaj san-centroj kia la supre menciita, kaj pli ol ducent mil kamparaj akuŝistinoj estas trejnitaj en la novaj metodoj. Kiu povus dubi ke kun tiaj akuŝistinoj kiaj Ĉjang, Ĉen, Ljoŭ kaj Hu, la patrinoj kaj la estonta generacio de Ĉinio certe estas zorgataj en bonaj manoj?



Juna akuŝistino Ĉen Ŝju-ĉjoŭ en vizito al Li Ŝjoŭ-jing.

Rakonto Hazarde Aŭdita

Ĉin Ĝaŭ-ĵang

Estas matenoj sur la ebenejo, en printempo, kiam la suno brilas tra maldika nebulo kaj la lumo estas milda kaj karesanta. Oni vere sentas tiam, ke la printempo estas juna kaj dolĉa sezono, sezono de naskiĝo. Promenigante la rigardon tra la kampoj plenaj de junaj tritikoj, oni apenaŭ povas reteni sin de brustostreĉo, longa enspiro kaj ekkanto.

En unu el tiaj tagoj, kun libro en la mano, mi vagis al la draŝejo sude de la vilaĝo kie mi restis, kaj apogante la dorson sur pajlostako mi sidigis por legi. Ĉe la transa flanko de la sorgo-tiga heĝo troviĝis fruktarbejo kun persikarboj burĝonantaj.

Subite aŭdiĝis voĉoj de du junaj virinoj el la direkto de la legomĝardeno.

* * *

Vi scias, ni havas parcelon da tero ĉe la nordo de la vilaĝo, iom malproksima de nia domo. Dum la aŭtunaj kaj printempaj rikoltoj, mi ofte vidis lin laboranta unuope en sia kampo kontraŭ la nia. Kelkfoje niaj rigardoj renkontiĝis, sed neniu el ni parolis. Ĉar li loĝas en la Norda Vilaĝo kaj mi en la Suda. Ni ne konis unu la alian. Nur imagi, kiel ni povus interparoli? Aj, nur tia knabino kia vi povas ne senti honton.

Iun tagon mi denove sarkis en tiu kampo. Kia agrabla brizo ekblovus! Ĝi susurigis la grenfoliojn kaj mi sentis kvazaŭ mi englutus grandan kvanton da freŝa akvo. Rektigante mian dorson mi apogis min sur mia sarkilo kaj ne povis reteni min de ekkrio: "Ho—ŭej! Blovu, vento, blovu! Ho—ŭej!"

Divenu, kio okazis! En la kontraŭa kampo ankaŭ li rektigis sin kaj direktis sian rigardon al mi. Mi ruĝiĝis kaj forturniĝis. Tiam li chis: "Ho—ŭej! Blovu, vento, blovu! Ho—ŭej" Ne ridu, ĝuste tiel okazis. Mi ŝajnis, ke mi ne aŭdis kaj returniĝis al mia laboro.

Alian fojon mi iris partopreni reprezentantan kunvenon de la Junula Ligo. Ĝi okazis en la urbo, sed mi povis ekiri nur malfrue en la posttagmezo. Vi scias, kiel tedema panjo kelkatempe povas esti. Ŝi ne volis, ke mi iru, sed ŝi ne eldiris. Ŝi simple okupigis min unue per ĉi tio kaj poste per tio. Kiam mi faris ĉion, ŝi diris: "Mia infano, vi certe laciĝis, mi infuzu teon por vi." Mi atendis dum ŝi boligis akvon kaj miris, kion ŝi ankoraŭ elpensos. Post nelonge, ŝi diris: "Infano, kial iri hodiaŭ? Estas jam malfrue. Iru morgaŭ..." Mi estis tiel ĉagrenita, ke mi forlasis ŝin sen adiaŭdiro.

Kiam mi atingis la gubernian urbon, mi iris rekte al la kunvenhalo. Ho, kia granda homamaso! Sed mi tuj ekvidis lin en la amaso. Ne interrompu. Mi ne sciis tiutempe ke li estas reprezentanto de la Norda

Vilaĝo. Mi ne konis eĉ lian nomon. Sed mi trovis lin en la amaso je la unua rigardo, ĉu ne strange?

Li rigardis min. Mi forturniĝis por havigi al mi sidlokon. Do ankaŭ li estas ligano, mi pensis, tre progresema homo. De post tiu tempo li ĉiam estas en mia koro.

Iutage mi vizitis la domon de Ŝang Ŝjang-gŭej por aĉeti fabkazeon. Mi portis kun mi libron. Kiam mi legis kune kun ŝi, iu envenis. Ja estis li. Kiam li ekvidis min, li surpriziĝis, ruĝiĝis kaj staris senmove.

Ŝjang-gŭej estis la unua, kiu rompis la silenton. "Kuzu, bonvolu diri al mi, kio estas tiu ideografo?"

Li rigardis en la libron kaj respondis: "Tio estas 'kang', la vorto por grenŝelo." Poste li tuj foriris.

Ŝjang-gŭej ridis je lia embarasiĝo. Mi malkovris, ke li estas ŝia kuzo kaj membro de la Junul-liga Komitato de la Norda Vilaĝo. Lia kultura nivelo estas alta. Kiam mi eliris tian informon el Ŝjang-gŭej, ŝi ankaŭ ridis je mi.

Dum la sekvinta rikolto, mi falĉis maizon en la kampo. Subite vento ekblovus kaj alportis pluvegon. Mi ne havis sufiĉan tempon por atingi mian hejmon. Do mi iris ŝirmiĝi en mat-budo apud melona kampo. Imagu, kiun mi vidis tie. Ja estis li! Estis strange, ke ankaŭ li iris tien. Mi staris ekstere kun la vizaĝo deturnita kaj koro rapide batanta. La pluvo senĉese torentis.

Mallaŭta voĉo diris: "Estus bone eniri, vi estas trae malsekigita." Li mem ja estis same malseka kiel mi.

"Bonvolu eniri kaj mi restos ekstere," diris li ride, tante sed iom honteme. Tiam mi eniris kaj poste ankaŭ li sin sidigis ĉe la aperturo de la budo kun la dorso kontraŭ mi. Ni sidis tie kaj neniu ekparolis. La pluvo daŭris kvazaŭ ĝi neniam ĉesus.

Mi pensis ke li estas vere bona homo.

"Ĉu vi ne loĝas en la Norda Vilaĝo?" mi demandis. "Kial vi venis kaj serĉis ŝirmejon ĉi tie?"

Li embarasiĝis kaj balbutis: "Ĉar ĝi... estas pli proksima... ol la Norda Vilaĝo."

"Sed vi scias, ke ĝi ne estas pli proksima."

"Ne, ne pli proksima, sed mi volis veni ĉi tien," li ridis.

Mi jam bone divenis lian intencon, sed mi ankoraŭ demandis: "Kial vi volis veni ĉi tien?"

"Mi nur voli tion," li respondis.

"Nu, sed nepre ekzistas iu kaŭzo."

"La kaŭzo estas..."

"Estas kio?" mi demandis.

"Estas vi!"

Mi estis embarasita kaj iom timigita de tiu respondo. Mi ankoraŭ memoras tre klare, kiel li deŝiris folieton de herbo, ĝin mordetis kaj forĵetis kaj diris: "Mi volas paroli kun vi."

KOREKTO

Aŭgusta numero, p. 192, linio 5 legu:
Kiangsu-provinco

"Paroli kun mi? Tamen mi eĉ ne konas vin." mi diris.

"Ĉu vi efektive ne konas min?" demandis li.

"Kompreneble. Mi eĉ ne konas vian nomon."

"Ĉu ni ne vidis unu la alian antaŭe?"

"Ni vidis unu la alian, sed tio ne faris nin konatoj," mi respondis.

"Mi scias ke via nomo estas Ĝang Ŝjaŭ-jun."

"Nu, mi ne konas vin. Ne diru sensencaĵon al mi," mi ŝajnigis koleron.

Post kelke da minutoj li diris: "Bone, se vi ne konas min, estas pli dece, ke mi foriru." Li starigis kaj ekiris for.

Mia koro batis violente. Kurante el la budo, mi vokis:



Li desiris folieton de herbo, ĝin mordetis....

"Kamarado Ŭang Feng-kŭej! Kamarado Ŭang Feng-kŭej!"

Li haltis, sed diris nenion. Nek mi. Post iom da tempo mi lin demandis: "Kiam vi estis venanta de la kamparo en tiun ĉi budon, kial mi ne vidis vin?"

"Mi venis per ĉirkaŭiro," li diris. Ni ambaŭ ridis.

"Via kultura nivelo estas pli alta ol la mia; mi esperas, ke vi helpos min en lernado," mi kolektis mian kuraĝon.

"Ankaŭ la mia ne estas tre alta," li respondis.

"Mi scias, ke ĝi estas."

"Kiel? Ĉu vi ne diris antaŭ nelonge, ke vi ne konas min?"

"Kia tedulo vi estas! Eĉ ridi!"

"Ŝjaŭ-jun, mi deziris paroli kun vi por preskaŭ du jaroj. Vi scias, kiel mi...."

Mi sciis kion li estis dironta al mi, sed estis tre ĝene tion aŭdi, tial mi interrompis lin: "La pluvo jam baldaŭ ĉesos, mi jam devas hejmeniri."

Mi forlasis la budon, kaj li ne retenis min.

Mi apenaŭ faris kelke da paŝoj, kiam iu elpaŝis de malantaŭ la budo. Estis panjo! Ŝiaj ŝuoj estis kotumitaj kaj ŝia pajloĉapelo dancetis dum ŝi rapidis antaŭen. Ŝia vizago paligis de kolero kaj ŝia bastono tremis en la mano. Ŝi tuj komencis riproĉi min per raŭka voĉo:

"Kial vi ne iris hejmen, vi stultulino! Kiel vi povis stari en pluvo kaj paroli kun knabo—nekonata knabo! Vi alportis malhonoron al mi kaj al la familio!"

Mi bone konis la humoron de panjo. Ŝi dirus ankoraŭ pli akrajn vortojn, se mi farus respondon. Tial mi konservis silenton kaj iris hejmen. Mi ŝanĝis miajn vestojn, kaj prenis ion por manĝi, pensante senĉese pri Feng-kŭej. Kiam panjo envenis, ŝi denove komencis riproĉi min.

Mi eliris kaj rakontis ĉion okazintan al la prezidanto de la virina asocio. Ŝi diris al mi: "Ŝjaŭ-jun, se vi jam decidis kaj prenis la aferon serioze, mi helpos vin, ne timu."

Nun prezentu al vi, mia patro mortis, kiam mi aĝis nur ses monatojn kaj mia frato estis kvinjara. Panjo havis tiam 27 jarojn. Ŝi devis lukti per si mem dum 18 malfacilaj jaroj. Nur pensu, kun du infanoj ĉe si, pri ĉio ŝi devis peti la helpon de aliuloj.

En ĉiu novjara tago, kiam ni manĝis pasteĉojn, ŝi metis kutime ekstran paron da manĝobastonetoj sur la tablo. Ŝi estus ofendita, se oni demandus por kiu ili estis. Por ŝi, paĉjo estis ĉiam vivanta. De tempo al tempo mi trovis ŝin ploranta. Ĉiuj scias, kiel multe ŝi amas min kaj mian fraton. Sed ŝi

konservas en si tiom da ridindaj elmodiĝintaj ideoj.

Antaŭ kelkaj jaroj, ŝi volis havigi edzinon al frato. Li insistis, ke li mem elektu sian kunvivulinon. Alie, li diris, li forlasus la hejmon. Panjo cedis malgraŭvole, kaj permesis, ke li renkontu tri knabinojn, el kiuj li elektis sian edzinon.

Mia bofratino estas tre bona kaj progresema. Ŝi kaj mia frato multe amas unu la alian. Sed ŝi ne plaĉis al panjo. Panjo opiniis ke la bofilino absorbas tro multe da atento de mia frato kaj li ne amas sian patrinon tiel multe kiel antaŭe.

Ĉiuespere panjo insistis ke frato babilu kun ŝi, kaj ne lasis lin for antaŭ ol li tre laciĝis. Kiam ajn ŝi aŭdis la junan paron interparolanta kaj ridanta en sia ĉambro, ŝi ekkoleris. Fine mia frato ne povis plu toleri kaj transloĝiĝis.

Nia Okcidenta Antaŭurbo

Feng Ĝi

Metamorfozon jen trairas nia Sjiĝjaŭ*,
Okazas nov-mirakl' en ĉiu palpebrumo.
Kie antaŭe gapiĝis tomboj neglektataj,
Imponas nun domegoj kun elektra lumo.

Jam de tre longe la virinoj de ĉi loko
Kutime iris en vestaĉoj flik-ĉifonaj.
Sed jen sur iliaj vestoj novaj kun mirvoko
Koketas tiom da desegnoj ĝuo-donaj.

Flegadis la publika park' nur mortsilenton,
Kaj bestoj malsatmortis en menaĝerio.
Nun ĉie vivo bolas, bruas, homtorenton
Allogas l' elefantoj el Viet-nam kaj Hindio.

* Sjiĝjaŭ: ĉina-lingve, okcidenta antaŭurbo.

Sur la ŝose' malnova pli kaj pli spacmanko
Ĝenas al veturil-trafik' la pli prospera,
Sed iu nova ekaperas ĉe la flanko,
Kiam ĝi petas helpoj de la ter' libera.

Antaŭ cent jaroj estis mistika poeto**,
Kiu vid-volis paradizon en sablero.
Lia sablero, kompreneble,—ja tro eta,
Kaj lia paradizo—ankaŭ nur himero.

Sed ni, en nia propra antaŭurbo, vidas
Ke, de l' ĉefurbo ĝis la fora land-bordero,
Kreskas sub milionoj da laboraj manoj
La feliĉega paradizo sur la tero.

**La angla poeto, Villiam Blake.

Post tio panjo traktis min pli rigore. Ŝi malaprobis mian partoprenon en kunvenoj aŭ kursoj. Kelkfoje ŝi tiel koleris, ke ŝi kuŝis enlite tri tagojn dirante nenion. Mi klopodis amuzi ŝin. Mi kuiris, portis la mangaĵon al ŝi en la lito kaj persvadis ŝin manĝi.

La sekvintan tagon post la okazaĵo en la pluvo mi iris denove por sarki la grenkampon. Mi rimarkis, ke panjo iras post mi, sed mi ŝajnis, ke mi ne vidas ŝin. Kiam mi pasis preter Feng-kŭej, mi enmanigis al li leteron kun la jena enhavo: "Feng-kŭej, mi jam decidis spite al ĉio kio povus okazi. Sed kia estas via intenco? Bonvolu respondi."

La sekvintan matenon, mi trovis la pordon de mia ĉambro ŝlosita. Mi komencis kanti ĉiujn kantojn, kiujn mi memoris. Mi ne tuŝis la mangaĵon kaj akvon alportitajn de panjo tra la fenestro. Tri tagoj pasis. La prezidanto de la virina asocio vizitis panjon. Mi aŭdis ilian interparoladon. Ŝi diris al panjo, ke la malnova feŭdisma agmaniero jam elmodiĝis kaj fariĝis senutila; ŝi parolis poste pri la nova geedziĝa leĝo kaj la rajto de gejunuloj elekti por si vivkunulojn. Fine, panjo estis konvinkita kaj liberigis min.

Mi manĝis iom kaj iris al la kampo. Feng-kŭej jam finis sian laboron, sed li estis tie min atendante.

"Mi atendis vin jam tri tagojn," li diris donante al mi sian respondleteron. Ĝi legiĝis: "Ŝjaŭ-jun, ankaŭ mi jam faris mian decidon. Mi longe argumentis kun mia familio kaj ĝi fine donis sian konsenton. Mi esperas, ke vi havas la saman decidemon persvadi la vian."

Mi donacis al li kaptukon, kiun mi aĉetis antaŭ kelke da tagoj.

Kiam mi revenis hejmen, mi trovis panjon ploranta. De post kiam mia frato transloĝiĝis, ŝi decidis edzinigi min al iu, kiu venos kaj vivos en nia domo kvazaŭ ŝia filo. Ŝi diris: "Kiel mi povus plu vivi eĉ unu tagon, kiam la revo de la vivo estas tute dispecigita!" Ŝi ploris

tiel dolore, ke mi brakumis ŝin kaj ankaŭ komencis plori.

Tri monatoj pasis antaŭ ol mi revidis Feng-kŭej'n. En januaro okazis foiro en Lungŭan-vilaĝo. Panjo iris kun mi. Ni vagadis inter la budoj kaj mi aĉetis notlibron. Panjo konsideris tion malŝparo, ĉar la notlibro, kiun mi havis hejme estis ankoraŭ ne eluzita. Ni venis al iu tendo kun la surskribo: "Propaganda Budo por la Nova Geedziĝa Leĝo." Mi pensis ke jen estas la ĝusta medikamento por mia patrino.

"Jen estas interesa spektaklo!" mi diris kaj kondukis ŝin internen.

Tie troviĝis vicoj da bildrakontoj kun klarigantoj por la bildoj, kaj ankaŭ personoj kiuj rakontis historietojn kaj kantis baladojn. La tendo estis plena de homoj. Ni rigardis la bildan serion pri la "Infano-edzo" kaj mi legis la klarigojn al panjo. Ŝi ŝajnis malaprobon kun tordita buŝo, sed atente aŭskultis.

Ni aŭskultis ankaŭ historieton ĉe rakontisto kaj poste iris vidi teatraĵon.

"Vere ĝi estas via tago. Oni babiladas ĉie pri libero," diris panjo duonserioze.

"Ĉar libero estas granda afero."

"Nun vi povas fanfaroni laŭplaĉe," ŝi diris, sed ŝi daŭrigis la aŭskultadon.

Kun ia preteksto mi forlasis panjon kaj kuris al la malantaŭo de la scenejo, kie mi trovis Feng-kŭej'n helpanta la anojn de la Nordvilaĝa teatro-trupo ŝminki kaj vesti sin. Li portis la kaptukon kiun mi donacis al li. Frapetante lin sur la ŝultro mi petis ke li sekvu min. Ni trovis kvietan lokon.

"Kion vi estas rigardanta?" mi demandis.

"Vi surmetis hodiaŭ novajn vestojn kvazaŭ...."

"Kvazaŭ kio?"

"Kvazaŭ vi estus preta por edziniĝo." Li ridetis.

Mi ruĝiĝis kaj ne sciis kien turni la rigardon. Li tuŝis mian manikon. "Ŝjaŭ-jun, ĉu vi aŭdis hodiaŭ la rakontojn pri la libero de geedziĝo?"

"Jes. Kial demandas pri tio?"

"Do, kiam iros ni?"

"Kien iri?"

"Vi ja scias kion mi aludas," li respondis. "Iri por la geedziĝa rajtigilo."

"Verŝajne panjo jam cedos fine," mi diris. "Atendu ankoraŭ kelkajn tagojn." Mi donis al li la notlibron kiun mi ĵus aĉetis. Tiam mi turniĝis kaj vidis ke panjo staris ne malproksime, sed mi ŝajniĝis ke mi ne rimarkis.

"Vi fariĝas nun tiel sentima," diris ŝi, "ke vi jam estas preta forflugi!" Mi ridis kaj kuris hejmen je unu spiro. Panjo revenis poste kun tordita buŝo sed diris nenion.

Hieraŭ, la prezedanto de la gubernia virina asocio, Ĝaŭ Ju-ĉen, venis al nia vilaĝo kaj faris paroladon pri la nova geedziĝa leĝo. Mi diris al panjo: "Hodiaŭ oni prezentas spektaklon en la lernejo. Ni iru rigardi."

Ŝi diris: "Mi kredas, ke oni prezentas ree vian 'geedziĝan leĝon'. Mi ne volas iri." Tamen ŝi iris.

Kamaradino Ĝaŭ parolis tre bone pri la tempo, kiam la virinoj estis vendataj kaj aĉetataj kvazaŭ dombestoj. Ŝiaj paroloj emociis ĉiujn ĝis larmoj kaj revokis maldolĉajn memorojn al la pli aĝaj virinoj. Poste ŝi parolis pri la novaj situacioj, la nova libero de virinoj.

Sur la vojo hejmen panjo silentadis. Kiam ni alvenis hejmen, ŝi diris: "Mia infano, tio, kion kamaradino Ĝaŭ parolis, estas vero. Dum multaj jaroj mi luktis sola kaj neniu dividis kun mi la malfeliĉon. Mi simple intencis reteni vin kaj vian fraton apud mi. Mi ne pripensis, ke ĉiu el vi havas antaŭ si sian vivvojon.

Kurantaj Aferoj

Koreaj Orfoj Prizorgataj en Ĉinio

Pli ol 500 koreaj infanoj, orfigitaj de la Usona agresa milito en Koreio, nun ĝuas ĝojan lernejan vivon en la malgranda apudmara urbo Ŝanhajĝŭan, ĉe la orienta ekstremo de la ĉina antikva Granda Muro.

Tiuj koreaj orfoj venis al Ŝanhajĝŭan en lasta oktobro. Kiam ili alvenis la loka popola registaro provizis ilin per vastaj loĝejoj kaj vestaĵoj. Ĉar la plimulto de la infanoj ne estis sanaj pro la suferoj kaŭzigitaj de la milito, kuracistoj kaj flegistinoj kun medicinaj provizoj estis sendataj por ilin zorgi. La koreaj infanoj baldaŭ resaniĝis kaj komencis normalan vivon en lernejo. En aŭgusto de tiu ĉi jaro, ĉiu infano gajnis pezon meznombro je ok kilogramoj. La plejmulto de ili bone faris siajn lerneajn ekzamenojn.

Ĉinaj geonkloj kaj amiketoj donacis al ili radio-aparatojn, vestojn, bombonojn kaj aliajn donacojn. Krome, ili ofte ĉeestas prezentadon de filmoj fare de la Ĉina Popola Liberiga Armeo.

Kurantaj Aferoj

Vi ja scias kiom mi suferis dum la longaj jaroj kaj kiel malplena fariĝis mia koro." Ŝi ne plu povis paroli kaj eksplodis per larmoj. Ankaŭ mi ne povis reteni min de plorado. Min ĉirkaŭprenante ŝi diris: "Venigu Feng-kŭej'n, mi volas paroli kun li."

Imagu, kiel mi ĝojis! Mi kantis dum mi flugis al la Norda Vilaĝo. Mi iris rekte al lia hejmo kaj trovis lin. Mi diris, sen salutado al la aliaj anoj de la familio: "Feng-kŭej, venu kune kun mi."

Li formetis sian laboron kaj sekvis min.

"Kio okazis? Kion vi volas?"

Mi ne respondis. Li demandis refoje, sed mi nur ridis.

En nia domo, panjo metis siajn manojn sur liajn ŝultrojn kaj rigardis fikse dum longa tempo.

"Jes, bona paro," ŝi diris. "Mi donas al vi mian konsenton."

Hodiaŭ ni iris al la distrikta registaro. Rigardu, jen nia geedziĝa rajtigilo.

Cetere, panjo jam sendis iun al mia frato kaj bofratino por peti ilin reveni hejmen.

* * *

Poste aŭdiĝis nur flustroj kaj ridoj kaj tiam subite aliĝis basa voĉo de iu viro.

Mi grimpis sur la supraĵon de la brulligna amaso kaj sekvis ilin per rigardo, tuj kiam la parolantoj forlasis la fruktarbejon. Unu estis virino, kiu portis uniformon de ŝtata oficisto. Apud ŝi iris maldika knabino en bluzo kun ruĝaj kvadratesegnoj, tenante alte sian kapon. Kune kun ili paŝis altkreska junulo en bluaĵ vestoj kun la kapo kovrita per blanka tuko laŭ la modo de kamparanoj.

Eĉ kiam mi ne plu vidis ilin, mi ankoraŭ aŭdis ilian ridon.

Mallongige tradukita el "Vilaĝaj Skizoj" publikigita en la ĉinlingva monata gazeto "Popola Literaturo", n-ro 5, 1953.

EL POPOLA ĈINIO

Monata Informa Bulteno Eldonata de Fremdlingva Eldonejo

Redakcio: 26 Kuo Hui Chieh, Peking, Ĉinio
Administracio: 38 Suchow Hutung, Peking, Ĉinio

KVARA JARO N-RO 10

EN H A V O

Nova Ĉinio Marŝas sur la Vojo de Industriigo
Liberigitaj el Usonaj Hombuĉejoj

La Baŭĝi-Ĉengtu-a Fervojo—Nova Arterio en la Interno de Ĉinio

Malnova Ŝtal-fabriko Renaskiĝis

Printempo en la Maŝinejo

Du Infanoj en Longvojaĝa Vagonaro

Vilaĝa Patrin-infana San-centro

Rakonto Hazarde Aŭdita

Nia Okcidenta Antaŭurbo



Hejmen veninte de la lernejo, ili skribas leteron: "Karaj
Oĉjoj Volontuloj...."

Pentrita de Ĉjang Ĝaŭ-ho